

# PACO POR LA JARMILO

ELEVAÇÃO

1ª eldono en Esperanto

Paz para Milênio - esperanto ok.1 1 10/10/2007 18:32:37


Fábrica de sonhos
Rio Tókio
A mais Honda
CR-V
HONDA
IBAMA
PROCONVE
Homologado
Novo CR-V
Liberdade é ser você mesmo
Rio Tókio - Botafogo: Rua General Severiano, 201 / Rua da Passagem, 175 • Tel (21) 2122-4999 • fax (21) 2122-4990
Narita - Barra da Tijuca: Av. das Américas, 2001 • Tel (21) 3987-8888
Rio Tókio - Recreio: Av. das Américas, 14.001 • Tel. (21) 2323-9000 • Fax (21) 2323-9026
www.riotokio.com.br • botafogo@riotokio.com.br • recreio@riotokio.com.br
Rio-de-Ĵanejro/RJ, Brazilo



# Nova Ordono de Jesuo

Diris Jesuo: "Novan Ordonon Mi donas al vi: Vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos Amon unu al alia. (...) Jen estas mia Ordono: ke vi amu tiel same, kiel Mi vin amas. Neniu havas Amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian Vivon por siaj amikoj. Vi estas miaj amikoj, se vi faras tion, kion Mi al vi ordonas: Vi amu kiel Mi vin amis. Mi jam ne nomas vin sklavoj, ĉar la sklavo ne scias, kion lia sinjoro faras; sed Mi nomis vin amikoj, ĉar ĉion, kion mi aŭdis de mia Patro, mi sciigis al vi. Vi ne elektis min, sed Mi elektis vin, kaj starigis vin, por ke vi iru kaj donu frukton, kaj ke via frukto daŭru; por ke la Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de Li en mia nomo. Tion Mi ordonas al vi: ke vi amu kiel Mi amas vin. (...) Kiel la Patro min amas, tiel Mi ankaŭ vin amas ; restadu en mia Amo".

(Evangelio de Jesuo, laŭ Johano, 13:34 kaj 35; 15:12 al 17 kaj 9).

# Prezento

Unu idiomo por ĉiuj popoloj. Estis kun tiu nobla kaj universalisma celo, ke Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859-1917) naskis Esperanton kun la malfacila takso starigi la internacian interkomunikadon kaj, kial ne diri, proksmigi la ligilojn, kiuj ankoraŭ apartigas la homojn, kaj trabati vojon al Paco. Kiel ĉiuj grandaj ideoj, kiuj venas al la mondo, estis multaj problemoj alfrontitaj de ĝia kreinto ĝis li konkretigis ĉion, kion li elpensis. La batalo valoris la penon kaj nuntempe, post 120 jaroj kiam la lingvo estis prezentita (en la jaro 1887) kaj de jarcento de la inaŭguro de Brazila Esperanto-Ligo en la urbo Rio-de-Ĵanejro, la idiomo estas viva, kun miloj da disigitaj esperantistoj tra la terglobo.

Arkivo BV



L.L. Zamenhof

Legio de Bona Volo (LBV) kaj ĝiaj Legianoj, ekde sia deveno, ankoraŭ en la 1940-jaroj, komprenis la altan gravecon de tiu servo. Eĉ per ĝia statuto ĝi ricevis de Fondinto de la Institucio, Alziro Zarur (1914-1979), la plej elstaran apogon: *"Batali por la plej granda disvastigado de la internacia lingvo Esperanto, altvalora ilo por la interfratiĝo de la popoloj, laŭ la konsidero, ke LBV estas la Esperanto de la religioj, samkiel Esperanto estas LBV de la lingvoj"*.


**LBV ESTAS LA ESPERANTO DE LA RELIGIOJ, SAMKIEL ESPERANTO ESTAS LBV DE LA LINGVOJ.**

Do de tiam multaj iniciatoj fruktis pro tiu duflanka kunlaborado: la Institucio disponigis spacon en siaj publikigaĵoj kaj radiaj kaj televidaj programoj por disvatigi kaj instrui la lingvon, kiel la historia *Kampanjo pri Bona Volo*, disradiigitaj en la jaro 1956, kiam la instruistoj Carlos Torres Pastorino (1910-1980) kaj Jorge Soares das Neves prezentadis la *Curso de Es-*

## ENHAVO



7
La Dinamismo de Paco


28
Pintkonferenco pri Monda Paco por la Jarmilo


40
La Organizo kiu edukas kun Ekumena Spirtualeco


54
Valorigo de Virino





Paz para Milênio - esperanto ok.4 4 10/10/2007 18:32:43

*peranto* (Esperanto-kurson). Aŭ ankoraŭ kiam Paiva Netto, Direktoro- Prezidanto de Legio de Bona Volo, elektis la idiomon de Zamenhof kiel unu el la oficialaj de la Monda Parlamento de la Ekumena Frateco, ParlaMundi de LBV, situanta en Brazilio, ĉefurbo de Brazilo.


Esti kune en tiu tasko multe honoris nin kaj, pro tio, ni nepre volis, pere de la universala idiomo, disvastigi la mesaĝon pri Paco kaj interkonsiliĝo de la preskaŭ sesdekjara LBV, ekzemple tiu publikigaĵo *Paco por la Jarmilo*, speciale la artikolo *"Dinamismo de Paco"*, verkita de Paiva Netto.

Tiu mesaĝo unuamomente celis la *Pintkonferencon pri la Monda Paco por la Jarmilo*, eventon organizitan de Unuiĝintaj Nacioj (UN), en Aŭgusto 2000, en ties novjorka sidejo, Usono, el kiu rezultis grava dokumento surbaze de kiu pli ol mil religiestroj, el pluraj lokoj de la Planedo, sin devontigis al kunlaborado favore al la planeda interkonsento. La enhavo de la mesaĝo de LBV, tradukita al kvar lingvoj (portugala, angla, hispana kaj franca), tiel fruktodone reeĥis ĉe la partoprenantoj, ke la tekston de Paiva Netto oni elektis por legi okaze de la konferenca fermo.

Krome, la tempo de aktivado de LBV en tiu organizo — ĝi agadas ĉe Unuiĝintaj Nacioj ekde 1994, akirinte en 1999 la statuson de ĝenerala konsultanto en ties Ekonomia kaj Socia Konsilio —, aldone al la universala tradicio de ĝia filozofio kaj servoj favore al la homa interkompreniĝo, havigis al ĝi la rajton kunordigi la reprezentantaron de brazilaj religiestroj en tiu evento, plenume al la letero sendita de ties komitata organizo al la gvidanto de LBV.

Per tiu laboro, Legio de Bona Volo salutas ĉiujn samideanojn, tiuj mondaj civitanoj partoprenantoj ian novan pensmanieron. Ankaŭ omaĝas la centjariĝo de esperanta movado en Brazilo kiu, tago post tago, fariĝas pli forta, kaj elektis Pacon kiel ilia vera vojo.

***La eldonistoj***




PACO POR LA JARMILO

**Kompostado kaj revizio:** Skipo Elevação
**Presado:** Mundial Artes Gráficas

**Kovrilo:** Alziro Braga
**Kovrilfoto:** Daniel Trevisan
**Enpaĝigo:** Felipe Tonin

**Tiu ĉi eldonaĵo estas ankaŭ publikigita al jenaj lingvoj: portugala, hispana, franca, germana, itala kaj angla.**

ELEVAÇÃO

Ĉiuj rajtoj de tiu ĉi eldono rezervitaj de
Editora Elevação
Rua Doraci, 90 – Bom Retiro
São Paulo/SP – Brazilo
CEP 01134-050

Tel.: (+55 11) 3358-6868
Fax: (+55 11) 3358-6882
www.bonavolo.com



Paz para Milênio - esperanto ok.5 5 10/10/2007 18:32:44



Sidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko, Usono, kie okazis la Pintkonferenco pri Monda Paco por la Jarmilo.


Arkivo BV



Paz para Milênio - esperanto ok.6 6 10/10/2007 18:32:50

# La Dinamismo de Paco

ESEO




José de Paiva Netto, ĵurnalisto, radiokronikisto kaj verkisto. Li estas Prezidanto de la Institucioj de Bona Volo.

Fratoj kaj Fratinoj je Homaro, kion la mondo atendas el la gvidantoj de ĉiuj sektoroj komence de religiestroj mem?

La vivanta ekzemplo de la Dia Amo, ĉar per ĝi Paco estos ebla. Sen tiu senco, la plej ellaboritaj planoj spertas frakaso-minacon. Ne estas propono esprimanta siajn plej bonajn rezultojn, sen iu etoso de vera interkompreniĝo kaj Bona Volo.

La mondo laciĝas pro trouzado de vortoj kaj manko de efikaj agadoj, nome agoj efektive taŭgaj kiel modelo por starigo de la spirito de konkordo kapabla transformi la homon de interne eksteren, io ne atigebla per dekreto. Memkomprenebla tia homa kaj spirita laboro pri ilumigado de estuloj devas esti subtenata per trafaj priokupoj politikaj, ekonomikaj kaj sociaj; Klerigado kaj Edukado, aldone al la nemalhavebla Ekumena Spiritualeco. Alivorte, perfekta agordo kun la Plejaltaj Sferoj de la Ĉiela Homaro, ĝis nun nevideblaj al niaj materiaj okuloj. La "mortintoj", tamen, daŭre vivas. Kaj jen ili nin influantaj ekde la komenco de la mondo.


Tial ni, ĉi tie kaj hodiaŭ, frate kunsidas.


Se ni, la religiuloj, ne elmontros senĉesan ekzemplon de Frateco, nia sola meritaĵo estos la plej severa puno fare de la Historio.


Inviti ĉiujn senprokraste eklabori en la Nobla Lernejo de Frata Amo, por ĝin efektive travivi, estas resume la tasko entreprenita de kredofondintoj. Harmonie plenumi ĝin estas finfine laŭiri vojon kondukantan al Paco.



Paz para Milênio - esperanto ok.7 7 10/10/2007 18:33:04


Arkivo BV
Budho


Arkivo BV
Sankta Aŭgusteno


Arkivo BV
Dietrich de Holbach

Ĉiu fina dokumento subskribita en ĉi tiu internacia Renkontiĝo estus tromposâjno lanĉita al la mondo, se ni ne revenos hejmen konvinkitaj pri tio, ke ni estas efektive Homaro, *"poemo de kompato"*, kiel deziris **Budho** (556-486 a. K.).

Ĉe la fino de la *Pintkonferenco de Monda Paco por la Jarmilo*, kies gastiganto estas Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, UN, ni definitive trapasu ĝiajn portalojn kiel Fratoj. Ĉi tieaj gefratoj, foraj gefratoj, gefratoj distancaj de ni miloj da kilometroj. Nur tiel ni kapablos kontentige plenumi tion, pri kio ni tie ĉi interkonsentos.

## La efika propono

La plej efika propono diskutota dum ĉi tiuj laborkunsidoj ardas en ĉies interno: ke ni amu unu la alian antaŭ ol tiuj, al kiuj ni intencas alporti mesaĝon pri renoviĝo. Kiel instruadis **Sankta Aŭgusteno** (354-430), ĉefepiskopo de Hipono:

— *"Tiamaniere estis kreita la Homo por la Amo, ke li nur sentas sin homa, kiam li ekkonscias plene ami"*.

Ĉiuj laboraj klopodoj sukcese plenumiĝos, se ni vere amos kaj reciproke interkomprenos unuj la aliajn, tial ke ni pretos superi la defiojn. Neniu laborprogramo sukcesos, ju pli bone ellaborita ĝi estas, se al ĝi mankos tiu intensa harmonio kaj senco de unueco en diverseco, por ke ni venku kontraŭecon.

## Teknologio kaj Paco

Neniam antaŭe la homaro atingis tiel grandan teknologian progreson. Kio do mankas por ke ekestu Paco? Mankas sublimigi la agadojn de progreso kun la Spiritaro nin plenpove akompananta — ĉu pri tio ni konscias aŭ ne, ĉu ni volas aŭ ne — ekde antaŭ la lulilo kaj pri kio ni devos esti heroldoj kiel Dikredantoj. Evidente komprenata kiel Amo, Vero kaj ankaŭ Justeco, kiu *"estas la apogilo de la mondo"*, dum *"maljusteco, male, estas naskiĝejo kaj fonto de ĉiuj veaĵoj kiuj ĝin suferigas"*, laŭ la penso de **Dietrich de Holbach**[*1] (1723-1789).

## Ni estas Homaro

Antaŭ ol daŭrigi, nepras klariga observo: ĉiam kiam Vi legos en miaj skribaĵoj aŭ aŭdos en miaj improvizaĵoj la vorton Ekumenismo, bonvolu konsideri ĝian originalan signifon. Etimologie la vorto ekumena — el la greka *oikoumenikós* — signifas "tutmonda celo aŭ aplikebleco; universala". Ni oftege uzas tiun vorton, ĉar ne ekes-


[*1] **Paul Heinrich Dietrich** — Germandevena franca filozofo. Li estis nomata Barono d'Holbach. Li diradis *"Justeco estas la apogilo de la mondo: maljusteco, male, estas la naskiĝejo kaj fonto de ĉiuj veaĵoj kiuj ĝin suferigas"*.



Paz para Milênio - esperanto ok.8 8 10/10/2007 18:33:20

tos vera Monda Paco dum ĝi ne koncernos ĉiujn loĝantojn de la Tero. La Paco de apartigitaj grupoj estas konstanta alvoko al novaj konfliktoj.

(Tial la trafo de la juda-germana pensulo kaj sciencisto **Albert Einstein** (1879-1955), kiam li konkludas, ke:


Arkivo BV
Albert Einstein


—*"Pacon oni ne povas teni perforte; ĝin oni povas konkeri per interkompreniĝo"*.)

En mia artikolo *Ne estas mondo sen Ĉinio*, publikigita en la magazino *International Business and Management*, en 1987, kaj represita por la partoprenintoj en la *4-a Konferenco pri Virinoj* okazinta en Pekino, Septembro 1995, mi substrekis:

La vojo de LBV estas tiu de Paco. Ĉesu la militoj! Brutaleco estas la leĝo de neraciuloj, ne de Homo, kiu mem ne konsideras sin tia. Ni predikas la valorigon de la homo, kiu konsistigas la riĉecon de iu ajn lando. La riĉaĵo de Ĉinio estas la ĉinoj, samkiel tiu de Brazilo kaj ceteraj nacioj konsistas el ties Popolo.

## Ekumenismo de Solidareco

Kontraŭ la tutmondigo de indiferenteco kaj de krimo urĝas kontraŭmeti la Ekumenismon de Solidareco, kiu malkonas tabuojn kaj antaŭjuĝojn homajn, sociajn, politikajn, ideologiajn, gentajn kaj religiajn, ĉar ĝia plej nobla emo celas nure kaj simple la Homan Estulon.



Arkivo BV
Gandhi

## Kunekzisti agorde kun Paco

Ke ni povu ripeti, nun pli ol antaŭe, kiel **Gandhi** (1869-1948):

*"— Mi estas nigrulo, blankulo, flavulo, ruĝulo, mestizo"*...

Pravis la Mahatmo, ĉar envere ni estas Homaro. Ekde la pratempoj ni tenas nerompeblajn ligilojn en tiu ĉi mondo. Ni estas do muzulmanoj, ŝintoistoj, katolikoj, brama-


Ĉina Murego
Reprodukto BV



Paz para Milênio - esperanto ok.9 9 10/10/2007 18:33:36




Pro la neebleco citi ĉiujn surterajn kredojn, ni respekte ilin bildigas en Dio, sen escepte, sur tiu ĉi mistika cirklo. En ĝi la Bona Volo peras la Ĉielan Patron kaj ĉiujn ilin, tial ke la Religio de Dio estas esence ekumena ĝis tia grado, ke ĝi frate bonvenigas eĉ la senkredajn fratojn. Li estas Amo kaj ankaŭ la senkreduloj estasj Liaj gefiloj.

nistoj, budhistoj, protestantoj, hinduoj, judoj, spiritistoj, esoteranoj, agnostikuloj, umbandistoj, ateistoj... **Ĝustadire, ni estas Homaj Estuloj!** Tio signifas, ke ni nepre respektu la rasoriginojn kaj la vidpunkton de nia similulo kaj, kune kun li, **kunekzistu agorde kun Paco** tiamaniere, ke ni povu manĉemane labori por tiuj, kiuj suferas, antaŭ ol ni ĉiuj, globskale, iĝos la suferantoj mem. La manko de solidara komprenkapablo kondukas la Planedon al iu antaŭagonianta fazo.

## Ekumenismo de la Animoj

La Ĉiela Patro atendas, ke ni lernu kunvivi pace en planeda komunumo. Ekzistas nur unu raso, la Universala Raso de la Filoj de Dio. En Legio de Bona Volo ni ekzercas la Dian Parton, kiu kuŝas en ĉiuj individuoj kaj atendas vekiĝon, por evidentigi sian efikecon je la Bono. Tial ni predikas la Senliman Ekumenismon, aŭ Ekumenismon de la Animoj, aŭ Ekumenismon de la Fratecaj Sentoj (kiu ĉion transcendas), ĉar ĝi prezentas la plej noblan modelon de Espero de tiuj, kiuj deziras unuiĝi sojle de feliĉa erao




Diego Basso



Paz para Milênio - esperanto ok.10 10 10/10/2007 18:33:52

por la popoloj. Iam la Scienco, kiu per tiom da progreso bonfaras al la nacioj, alvenos al la nepra kompreno pri tio kion la universalismaj mistikuloj jam perceptis, nome, ke ni estas unu.

Ĝustadire, de jardekoj mi defendas, ke la konflikto inter Religio kaj Scienco envere neniam ekzistis. Esence tiuj du scio-branĉoj estas komplementaj. La plej malhelpo por la granda ĉirkaŭpreno inter Religio kaj Scienco, kiuj estas fratoj, estas la pluekzisto, sur la scio-kampo, de la antropomorfa dio, kiu damaĝas ne nur la laboratorion, sed ankaŭ la altaron. (...)



Marteno Lutero

Dio ne havas homan formon. Ne temas do pri tio, kion tiel miope iuj ankoraŭ supozas pri Li. La surteranoj ne vidas Lin nun, sed povas senti Lin ĉiufoje, kiam vere amas, kaj de Li forestas, kiam malamas. Mi parolas pri la **Senmorta** Estulo kiu kreis la **Senliman** Universon. La Ĉiela Patro estus, se poezie diri, Sublima Ekvacio kies rezulto estas la Frateca Amo.



La Ekumena Kristo

(Eble pro tio, la eminenta germana reformisto-teologo **Marteno Lutero** (1483-1546) verse asertis:

*Pova fortikaĵo estas nia [Dio,*
*Bastiono neniam konkerita,*
*Nia savo meze de inundo*
*Da ĉiea homaj malbonaĵoj.)*

(…) La avangardo de Scienco, kiu venigos la Homon al konceptoj nuntempe neimageblaj por la plejmultaj direktas sian rigardon — sen kliŝaĵoj, antaujuĝoj kaj tabuoj — al Spiritualeco.

## La Ekumena Kristo

Kiam mi parolas pri Jesuo, mi prezentas Lin en ampleksa kunteksto, kiu transcendas



Paz para Milênio - esperanto ok.11 11 10/10/2007 18:34:07

tion, kion historie oni kutime komprenas kiel Kristanismon. De tio mia respondo okaze de intervjuo al la tiama Vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio, ĵurnalisto **Roman Dobrzyński**, el Pola TV, kiu venis al Brazilo partopreni en la inaŭguro de la Templo de Bona Volo (21-an/10/1989). En la okazo, li demandis al mi: *"Kiel eblas al Legio de Bona Volo prediki la Senliman Ekumenismon, parolante pri Jesuo?"* Al tio mi respondis: Unu el la grandaj taskoj de LBV estas ĝuste *Lin sensektigi*. La Dia Majstro ne estas sektema. Li estas eksterordinara koncepto pri Humaneco, Amo, Frateco kaj Justeco. Jen elstara servo, kiun Legio de Bona Volo plenumas por la monda socio.





Bildo pri la intervjuo de la Direktoro-Prezidanto de LBV al la ĵurnalisto Roman Dobrzyński, de la pola TV.

## Gradoj de Ekumenismo

Kiam ni parolas pri Ekumenismo, ni volas diri Universalismon, senliman Fratecon. Multe da homoj, tamen, eble pripensos Ekumenismon nur Religia, kio estas jam granda paŝo por la mondo urĝe bezonanta Pacon.

Tamen, ĉie la Ekumenismo pledas por sia praktikado, kiel tion montras Legio de Bona Volo laŭ la amplekso de ties agadoj sur la diversaj sferoj de la homa vivo:

Ekumenismo en Edukado
Ekumenismo en Komunikado
Ekumenismo en Politiko
Ekumenismo en Scienco
Ekumenismo en Arto
Ekumenismo en Filantropio
Ekumenismo en Ekonomio
Ekumenismo en Juro
Ekumenismo en Filozofio
Ekumenismo en Sporto
kaj tiel plu.




Alziro Zarur

Gravas ankaŭ substreki la Rasan aŭ Gentan Ekumenismon, la Klasan Ekumenismon, la Ekumenismon kiu peras la Naciojn, la Kulturan Ekumenismon, resume, ĉar oni ne povas preterlasi eĉ plej malgrandan eron el la kono kaj Frateco pene akiritaj de la popoloj. La kontribuo al la planeda pluvivado devas veni el ĉiuj lokoj, el viroj kaj virinoj, triboj kaj nacioj, de sur la Tero kaj de la Ĉielo de la Tero, ĉar estas vivo en la Spirita Mondo, kiel iam la kriteria Scienco pruvos, pro tio, ke la mortintoj ne mortas.

Tial mi predikas la Ekumenismon Senliman kaj la Tutan*[2]. Ĝi lasta proponas aliancon de la Du Homaroj, kiel diskonigadis **Alziro Zarur** (1914-1979):

*"— La sekreto de la registaro de la popoloj estas kunigi la Surteran Homaron al la Ĉiela Homaro".*

---

*[2] **Ekumenismo Senlima kaj Tuta** — Paiva Netto difinas du esprimojn, kreitajn de Alziro Zarur, kiuj resumas tiun ĉi temon: la Senlima Ekumenismo predikas la perfektan rilaton inter ĉiuj estuloj, sekve ĉiuj surteraj nacioj. La Totala Ekumenismo proklamas la fratecan aliancon inter la Homaro de la Tero kun tiu de la Supera Spirita Mondo, kaj kun iu ajn civilizacio ekzistanta en la Spaco. Kial ne?! Ĉu la tuta Universo nur atendas, ke ni — escepte de astronomoj, pensuloj kaj poetoj — senfare ĝin kontemplu?! Tio estas, kiam ni memoras levi la okulojn al ĝi… Estus arogo al ni akcepti la neeblecon pri ekzisto de aliaj vivoformoj en la Kosmo.




Paz para Milênio - esperanto ok.12 12 10/10/2007 18:34:21

Temas pri defia tasko plenumenda kuraĝe, racie kaj fide.

## Talmudo kaj Paco

Ĉio kio kutimas dividi, apartigi la Homojn en netoleremajn grupojn kontraŭstaras al Ekumena Idealo; sekve ĝi instigas netoleremon, kontribuas al konservado de tiu multaspekta incitego-stato, kiu kondukas la mondon direkte al neimagebla konflikto, kiun neniu homo kun sana menso povas deziri.

Ni komprenas Ekumenismon kiel la plej granda esprimo pri Amo, la gravito-akson de sana socio. Ĝi estas la natura stato kaj la spontana volo de ĉiu kreito, kiam ĝi estas spirite ligita al la Kreanto. La Ekumenismo predikata kaj travivata de Monda LBV altrudas nenion al kiu ajn, ĝi nur vekas inviton por natura kompreniĝo inter civilizitaj homoj.



Luko

(Instruas la Talmudo*[3]: *"— Amu Pacon kaj senhalte strebu al ĝi; amu la Homaron kaj montru la virto-vojon al viaj similuloj".)*

## Kompatemo kaj Bonvolemo

En la jaro 1987, en la ĵurnalo *Folha de S.Paulo*, mi publikigis:

Kiam ni parolas pri **unuiĝo** de ĉiuj cele al la bono de ĉiuj, kelkaj povas teruriĝi pensante pri kapitulacio de siaj vidpunktoj antaŭ la teda sameco de sendistinga alianco, la priplorinda homa aŭtomatismo. Tute ne temas pri tio. Ĉe la Dia Demokratio*[4] ĉiuj havas la devon (pli ol la **rajton**) honeste (nepra kondiĉo) kaj tolere esprimi siajn ideojn kaj pensmanieron. Tamen, neniu rajtas malami sub la preteksto pensi alimaniere. Jam diradis Gandhi, ke *"malkonsentoj de opinioj ne estas motivo por maltoleremo"*. Estas entute oportune la jena fundamenta instruo

Ĉe la Dia Demokratio ĉiuj havas la devon (pli ol la **rajton**) honeste (nepra kondiĉo) kaj tolere esprimi siajn ideojn kaj pensmanieron.

---

*[3] ***La Esenco de la Talmudo*** — Elektita kolekto de **Theodore M.R. von Keler** — Traduko: **Paulo Rónai**.

*[4] **Demokratio** — Laŭ difino de Paiva Netto, ĝi estas la reĝimo pri respondeco.



Paz para Milênio - esperanto ok.13 13 10/10/2007 18:34:33

de Jesuo legebla en la Evangelio laŭ **Luko**, 6:36-38:

*"36 Estu kompatemaj, kiel via Patro estas kompatema.*

*"37 Kaj ne juĝu, kaj vi ne estos juĝitaj; kaj ne kondamnu, kaj vi ne estos kondamnitaj; pardonu kaj vi estos pardonitaj.*

*"38 Donu, kaj estos donite al vi; bonan mezuron, premitan, kunskuitan, superfluantan, oni donos en vian sinon. Ĉar per kia mezuro vi mezuras, per tia oni mezuros al vi".*

## Ekumena tipo

(...) Ni vivas en epokoj anoncantaj veran Spiritan Renoviĝon. La planeda socio, konsistanta el disaj elementoj, travivas senekzemplan krizon. Prisciante aŭ ne, ĝi serĉas, kvankam per serpentumaj vojoj, sian Dian Identecon, sian, ni povas diri, Ekumenan Tipon. (...) Pli fortaj estas la faktoroj nin kunigantaj, ol la facilanimeco, kiu eventuale nin disigas.

La senelira situacio, kiun la homa malprudento starigis dum la jarmiloj nuntempe resumiĝas al tio: aŭ ĝi integriĝas aŭ ĝi malintegriĝas. La elekto koncernas nin, ni ne kulpigu Dion pri tio.

## (La Ekumenismo kiu emociiĝas antaŭ Doloro

La Homaro estas familio. Kaj ne ekzistas eĉ unu sola familio, en kiu ĉiuj idoj prezentas la saman konduton. Ĉiu homo estas sendependa universo, sed tio ne signifas, ke tiuj "ĉielaj korpoj" devas interpuŝiĝi. Tio estus la ĥaoso.

Tial, ni devas travivi Senliman Ekumenismon, ne tiun limigitan nur al kristanoj, kiuj konsistigas parton de la popoloj. Kaj plie: Ekumenismon ne limigitan al religioj, sed tiun kreskantan sur la kampoj de scienco, filozofio, politiko, sociklasoj, profesioj, futbalteamoj, etnoj kaj tiel plu, samkiel trovantan super la perspektivo de kono, kiu regas la inteligentecon sur ĉi tiu Planedo; ĉar ni ankoraŭ spertas nur ian deziron pri ĝi, ne la Konon mem, laŭ ampleksa senco, ĉar tio signifus enprofundiĝi en la oceanon de la Dia Scio; korpe kaj Anime droni en la luma maro de la Saĝeco de Dio. Ni pledas por Ekumenismo el Koroj, el bonaj sentoj, kiuj ne dependas de ordinaraj malsamecoj en la homa familio, per kiu homoj rezonadas laŭ propra maturiĝo, laŭ la vasteco aŭ malvasteco de sia scio. Ni parolas pri Ekumenismo, kiu emociiĝas antaŭ doloro, kiu deprenas ĉemizon por vesti nudulon, kiu donas resanigan balzamon al malsanulo, kiu protektas orfojn kaj vidvinojn[*5], kiu konscias pri tio, ke Edukado kun Ekumena Spiritualeco estas nepre necesa por leviĝo de Popolo, fortikigo de nacio (ne por superregado super la aliaj), protektado de lando kaj postvivado de ĉi tiu ĉiela mondo, kiu nin akceptas kiel idojn ne ĉiam bonkondutajn.)[*6]

## Brigado de Amikiĝintaj Religioj

La radiprogramo *Hora da Boa Vontade* (Horo de Bona Volo), lanĉita de Alziro Zarur, karmemora Fondinto de Legio de Bona Volo, la 4-an de Marto 1949, ĉe Radiostacio Rádio Globo, en Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, estis la komenco de LBV. Nelonge poste, la 1-an de Januaro 1950, ĝi estis oficiale fondita kun la misio disvastigi la Ekumenan Fratecon, bazo por la interkompreniĝo kaj unuiĝo de ĉiuj homoj, sendepende de iliaj kredoj kaj filozofioj.



Paz para Milênio - esperanto ok.14 14 10/10/2007 18:34:46

Ekde ĝia fondaĵo en la 1950-aj jaroj, la diskonigado de tiuj idealoj de Legio de Bona Volo vaste eĥis, starigante tiamaniere novan etapon sur la kampo de sociaj interrilatoj, kiuj tiam komencis ricevi la influojn de la Tuta Ekumenismo, la plej elstara karakterizaĵo de la Institucio jam en ĝia naskiĝepoko.

Tial LBV, prenante kiel modelon la universalajn instruojn de la Kristo, sin dediĉis al la Brigado de Amikiĝintaj Religioj, daŭrigante tiun pioniran laboron de ampleksigo de la ekumena konscienco, kiun Alziro Zarur defendis, ekde sia juneco, en la 1920-aj jaroj; tiu strebado havigis al li, kelkajn jarojn poste, la Vatikanan rekonon: tiam li ricevis de Lia Papa Nuncia Moŝto **Sebastião Baggio** la Medalon de la Papo **Paŭlo la 6-a** (1897-1978), "*pro servoj plenumitaj nome de Ekumenismo*".

## Historia Registro

(Cele al diskonigo ĉe la nova generacio, mi reeskribas tekston de mia artikolo "Urĝas reeduki", kiu aperis en la revuo *Solidara, Altruisma, Ekumena Socio**[7], pri la monda interreligia kunsido, starigita de Legio de Bona Volo, samkiel pri la kortuŝaj vortoj de du entuziasmaj famuloj pri Ekumenismo:

## Pastoro substrekas la devenon de LBV

Pere de la Solidara Laborgrupo de Legio de Bona Volo de Eŭropo, mi ricevis valoran ekzempleron de la gazeto *O Cristão* (La Kristano), de la 31-a de Januaro 1950, el urbo Rio-de-Ĵanejro. Temas pri la jubilea numero de la 58-a datreveno de tiu oficiala organo de Unio de Evangeliaj Eklezioj Kongregaciaj kaj Kristanaj en Brazilo. En ĝi ni trovas raporton,

La senelira situacio, kiun la homa malprudento starigis dum la jarmiloj nuntempe resumiĝas al tio: aŭ ĝi integriĝas aŭ ĝi malintegriĝas. La elekto koncernas nin, ni ne kulpigu Dion pri tio.

---


*[5] **Protekto al orfoj, vidvinoj, malsanuloj…** — Karitato-agoj rekomenditaj de Jesuo en Sia Evangelio aparte en la rakontoj de **Mateo**, 25:31-45.

*[6] La teskto interparenteze estas publikigita en la revuo *Solidara, Altruisma, Ekumena Socio* en la jaro 2000, direktita de Paiva Netto al la partoprenintoj en la *High Level Segment*, de Ecosoc (Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UN), en kelkaj lingvoj. Samkiel tiu ĉi, la amika legant(in)o trovos laŭlonge de tiu ĉi dokumento aliajn pecojn kun sama substreko. Temas pri paroladoj samtempe elsenditaj de Paiva Netto en la Super Reto Bona Volo de Komunikado (Radio, TV kaj interreto) okaze de legado de tiu ĉi paĝo.



Paz para Milênio - esperanto ok.15 15 10/10/2007 18:34:59

sur paĝo 10, titolitan "La valoro de kunlaborado", subskribitan de **Salustiano César**, Evangelia Predikisto, kiu registras la naskiĝon de Legio de Bona Volo (LBV), kreita de Zarur, je la 1-a de Januaro 1950. Ĉi-sube mi prezentas kelkajn pecojn, kiel historian dokumenton:



Salustiano César

**"Valoro de Kunlaborado**

"... Ni estas kunlaborantoj de Dio...

Apostolo **Paŭlo**, I Korintanoj, 3:9.

*"Ekzistas multo en la kristana vivo, ankoraŭ ne tute klarigita koncerne la evangelian povon. Kunlaborado estas unu el tiaj aferoj, kies pli profunda kompreno pri tiu koncepto estigos novajn vojojn cele al rimarkindaj realigoj.*

*"Ni sentas la bezonon paroli pri kunlaborado, sed ne tiel, kiel oni ĝenerale faras, per ornamitaj vortoj, per stila eleganteco.*

*"Mi komencos per la aserto, ke la spirito de kunlaboro inter ni ofte produktis tre malmultajn rezultojn en ĉiuj sektoroj de nia agadkampo. Mankas ne la sento kunlaborema. Ĉi tiu ekzistas en latenta formo en la koroj, tamen sen eduko, sen planado, sen direkto.(...)*

*"La valoro de kunlaboremo estas nepre evidenta en entreprenoj plej indaj je famo. (...)*

*"En la nuna socio oni trovas faktojn, kiuj prezentas verajn defiojn al la kristana popolo. Je la lasta 7-a de Januaro, speciale invitita kiel Protestanta Predikisto, mi partoprenis interesegan kaj same gravan kunsidon en la sidejo de Brazila Asocio de Amasmedioj, kie la kunlaborema spirito, en ege oportuna maniero, konsistis el reprezentiĝo de amaso da homoj de malsamaj kredoj kaj filozofiaj movadoj. Nia parolado, surbaze de Romanoj, 12, estis aŭskultita kun eksterordinaraj aplaŭdoj, flanke*

---

*[7] **Solidara, Altruisma, Ekumena Socio** — Koncepto prezentita de Paiva Netto antaŭ jardekoj, ripetita okaze de la 1-a Internacia Kongreso de la Frataj Laboristoj de Dio (okazinta je la 1-a de majo 1983, en la klubo Botafogo Futebol e Regatas, en urbo Rio-de-Ĵanejro) kaj publikigita en pluraj gazetoj brazilaj kaj eksterlandaj. Liaj vortoj difinis tiun koncepton pri la Idealoj de Bona Volo kiu estigas, ĝis nun, diversajn agadojn sur socia kaj eduka kampoj cele al realigo de publikaj politikoj pri pludaŭra disvolviĝo de Brazilo pere de la plej ampleksa socia integriĝo, nome tiu kiu favoras la materiajn kaj spiritajn bezonojn, kaj impulsas la edukadon de la Ekumena Civitano, aktiva elemento de Solidara Socio transformita per Amo. *"(...) La ekzemplo cele al troabundo — ne nur favorante al iu komunumo, sed al la tuta mondo — venas de la Ekumena Kristo, t.e., for de sektarismoj. Abundo, perfekte disdonita, nur povas estiĝi en Solidara, Altruisma, Ekumena Socio, kie ĉiuj interkompreniĝas kaj ĉiu rekonas sin kiel parto de giganta loĝantaro nomata Homaro. Eta organo, ju pli malgranda ĝi estas, se malsana, ĝi infektas la tutan organaron (...)"*, li asertis okaze de tiu evento. *"Solidara Socio, ĉar nepras unuiĝo; Altruisma, por ke tiu alianco efektivĝu surbaze de la Frateca Amo ekzempligita de la Kristo, per Sia Nova Ordono*: Vi amu unu alian, kiel Mi amis Vin. Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj (Evangelio de Jesuo, laŭ Johano, 13:34-35); *Ekumena, ĉar nepras interkompreniĝo en tiu ĉi Planedo por ke ĝi pluvivu. (...) Paciĝi do estas nia granda alvoko, bazita sur la fundamento de multjara ekumena elprovado de LBV: Brazilo kaj la mondo bezonas la tujan travivadon de ekumenismo religia, genta, entreprena, partia, socia, resume, la Senlima Ekumenismo, kiu parolas al ni pri la kompreniĝo inter la Homaj Estuloj kaj ties nacioj surbaze de valoroj pli profundaj de la Spirito, kaj la Tuta Ekumenismo, kiu rompas la barojn inter la materia mondo kaj la Spirita Mondo, kiel proklamadis Alziro Zarur."*



Paz para Milênio - esperanto ok.16 16 10/10/2007 18:35:11

En la revuo *BOA VONTADE* (BONA VOLO) aperinta je la 1-a de Julio 1956, paĝo 5, oni trovas ĉi tiun historian registron: “La Brigado de la Amikiĝintaj Religioj komenciĝis je la 7-a de Januaro 1950, en la Salono de la Konsilantaro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI, laŭ ĝia portugala siglo), kiam prelegis sep homoj: Teles da Cruz, katoliko; Murilo Botelho, esoteristo; Leopoldo Machado, spiritisto; Eugênio Figueiredo, liberpensulo; Pastoro Salustiano César, protestanto; Samuel Linderman, judo; Ascanio de Farias, pozitivisto. La memorindan kunsidon prezidis Alziro Zarur, Prezidanto de Legio de Bona Volo”.



Arkivo BV



*de aliaj prelegintoj: Izraelida, Pozitivisma, Esoterisma, Spiritisma, Rom-Katolika, (Liberpensa). Treege impresa estis tiu solenaĵo, pro la ĉefa celo kunigi ‘homojn de Bona Volo’, favore al tiuj, kiuj restis marĝene de la vivo. Tiucele, oni organizis ‘Legion de Bona Volo’, kiu asistos ‘sen antaŭjuĝoj’ ĉiujn, kiuj suferas sur siaj dolorlitoj, en siaj hejmoj aŭ enfermitaj en hospitaloj.*

*“Kia leciono estas tiu, kiu venas el Dio! (...)*


*“Ni agadu laŭ la spirito de la Dia Parolo, kiu diras:*

*“‘Amu vin kore unuj la aliajn, per frata amo, elektante honore unuj la aliajn.’*

*“Ne malrapidu en viaj zorgoj: estu fervoraj en spirito, kiam vi servas al la Sinjoro:*

*“Alparolu al la Sanktuloj en bezonoj, obeu gastamecon.”)*

Ne senkiale do, deklaris la itala filozofo **Pietro Ubaldi** (1886 – 1972) en la komenco de la 1950-aj jaroj:



Arkivo BV

Pietro Ubaldi

*— “Legio de Bona Volo estas nova movado en la Historio de la Homaro. Ĝi lokos Brazilon en la monda avangardo”.*

La bonefika rezulto, kiun tiu paciga predikado alportis al la socio estis memorigita, ankaŭ en 2000, de sinjorino **Maria Brígido**, okdekjarulino el la urbo Porto Alegre, ŝtato Rio Grande do Sul, Brazilo, kun simpleco. Tiu respektinda dommastrino, entuziasma aŭdanto de Super Reto Bona Volo de Radio (AM 1300), memorigis:


*“Ekde la inaŭ guro de la Brigado de Amikiĝintaj Religioj, fare de Zarur, mi trovis ĝin mirindaĵo. Kial la sekvantoj de iu religio ne povis rigardi la vizaĝon de aliuloj? Mi mem ricevis tian edukadon. Ekzemple: mi ne povis laŭiri trotuaron ĉe kiu troviĝus framasona loĝio. Kia sensencaĵo, Dio mia! Mi estis edukita tiel: se tie estis spiritisma societo, mi devis piediri sur la alia flanko de la strato. Mi lernis tiujn aferojn kiel infano, kaj tiaj samaj instruoj, bedaŭrinde, ankaŭ estis transdonitaj al ĉiuj tiamaj samaĝuloj”.*


S-ino Maria Brígido fine




Paz para Milênio - esperanto ok.17 17 10/10/2007 18:35:28

Ni devas elturniĝi de la zono de la problemoj, por elkapti la kernon de la solvoj. Tial la graveco de la Evangelio-Apokalipso, kiu estas la bazo de la tuta moderna civilizacio.


Arkivo BV
Andreo Ludoviko


Arkivo BV
Francisco Cândido Xavier


Reprodukto BV
Teokrito

substrekis, ke la nuna junularo estas privilegiita, ĉar *"danke al la ekumena laboro de LBV, nuntempe ni pensas alimaniere"*.

## Ĉiam estos espero

El mia libro *O Capital de Deus* [La Kapitalo de Dio] (Eldonejo Elevação), kiu aperadas artikole, mi substrekas:

Se iu veaĵo kolektive trafos al ni, tio okazos pro la trouzado de nia libera volo, ne pro tio ke la jarmilo sojlas.

En la libro *Ago kaj Reago*, de **Andreo Ludoviko**, laŭ psikografio de la Legiano de Bona Volo **Francisco Cândido Xavier** (1910-2002), ĉe iu momento la Spirito **Druso**, direktoro de Domo Paco (mirinda lernejo de realĝustigo, en la Spirita Mondo), sin turnante al Andreo Ludoviko kaj Hilario, kiuj troviĝas en tiu provizora Domo por akiri novajn instruojn, klarigas:

— *"(...) Niaj agoj teksas liberigantajn flugilojn aŭ forĝas sklavigantajn katenojn, por nia venko aŭ nia pereo. Al neniu alia ni ŝuldas nian destinon krom al ni mem"*.

Ni ne kreu do barojn por la facilaĵoj, kiujn Dio surmetis sur nia vojo. La progreso ĝuste kondukata, iluminita de la Supera Spirita Mondo, estas kontenteco por la popoloj. La Kreanto riveliĝas en la plej simplaj aferoj. Kiel asertis la greka filozofo **Teokrito** (320 –250 a.K.):

*"— Dum estas vivo, estas Espero"*.

Nu, nia reala ekzistado estas eterna, do... ĉiam estos Espero.




Paz para Milênio - esperanto ok.18 18 10/10/2007 18:35:42

Ni devas elturniĝi de la zono de la problemoj, por elkapti la kernon de la solvoj. Tial la graveco de la Evangelio-Apokalipso, kiu estas la bazo de la tuta moderna civilizacio.

## Parolas Pio XI


Menciindas ankoraŭ tie ĉi la admono de la Papo **Pio XI** (Achille Ratti, 1857-1939) en la Encikliko *Charitate Christi:*



Pio XI

— *"La fido je Dio estas la neskuebla fundamento de la tuta socia vivo kaj de la tuta respondeco sur la Tero (...)".*

Memkomprenebe la eksa kardinalo el Milano, Italio, aludas al tiu Dio rekonata kiel Amo, laŭ la difino de **Johano, la Evangeliisto**, en ties Unua Epistolo, 4:8 kaj 20.




Johano, la Evangeliisto

*"8 Kiu ne amas, tiu ne konas Dion, ĉar Dio estas Amo.*

*"20 Se iu diras: 'Mi amas Dion', kaj malamas sian fraton — tiu estas mensoganto; ĉar kiu ne amas sian fraton, kiun li vidis, tiu ne povas ami Dion, kiun li ne vidis".*

## Kardec antaŭvidis la disfalon de la limoj

En la 19-a Jarcento, analizante la Profetaĵon de Jesuo, nome, ke *"estos nur unu Grego por nur unu Paŝtisto"* (Evangelio laŭ Johano, 10:14 ĝis 16), la granda edukisto **Allan Kardec** (1804–1869), Elkodiginto de la Spiritisma Doktrino, skribis en sia libro *La Genezo:*



Allan Kardec

— *"Per tiuj vortoj Jesuo klare anoncas, ke iam la homoj estos unuiĝintaj per unu sola kredo; sed kiel povos efektiviĝi tiu unuiĝo? Tio ŝajnas malfacila, se oni konsideras la diferencojn ekzistantajn inter la religioj, la antagonismon, kiun ili instigas inter siaj sekvantoj, la obstinon manifestitan nome de la Vero, kiel ekskluziva propraĵo ilia. Ĉiuj religioj volas la unuiĝon, sed ĉiu aparte esperas, ke tiu unuiĝo okazos je ilia propra profito, kaj neniu el ili volas rezigni pri kio ajn rilate al siaj dogmoj.*

*"Tamen, la unuiĝo okazos en religio, samkiel jam komencas okazi socie, politike, komerce, per la disfalo de tiuj baroj, kiuj apartigas la popolojn, per la alproprigo de moroj, mondumaĵoj kaj lingvaĵoj. La popoloj de la tuta mondo jam interfratiĝas kiel provincoj de unu sola imperio. Oni antaŭsentas tiun unuiĝon, kaj ĉiuj volas ĝin. Ĝi realiĝos pro la forto de la okazaĵoj, tio estas, ĝi fariĝos io necesa por ke plifortĝu la rilatoj de Frateco inter la nacioj. Ĝi efektiviĝos per la disvolviĝo de la homa racio, kiu iĝos kapabla kompreni la sensencaĵon de ĉiuj disputoj, kaj per la progreso de Scienco, kiu pli kaj pli montros la erarojn devenintajn de tiaj malkonsentoj. Detruante en religioj tion, kio estas verko de la homoj kaj frukto de ties nescio pri la Diaj Leĝoj, la Scienco ne povos detrui tion, kio estas verko de Dio, la eterna Vero. Forigante la*



Paz para Milênio - esperanto ok.19 19 10/10/2007 18:35:54

LA DISFALOJ DE BAROJ, KIUJ APARTIGAS LA POPOLOJN, ANTAŬVIDITAJ DE KARDEC, POSTULAS EDUKADON MALSAMAN DE TIU KONATA, ĈAR LA SPIRITO DEVAS ESTI RIGARDATA EN ĜIA DIA DIMENSIO, LAŬ KIU AMO, KIU ESTAS DIO, MONTRAS SIN KIEL POTENCA HELPILO DE PROGRESO.

*akcesoraĵojn, ĝi preparas la vojojn por la unuiĝo. (...)*

*"Jam de kelka tempo iu movado agadas cele al malcentriĝo, havigante al si nevenkeblan forton. La principo pri neŝanĝebleco, kiun la religioj ĉiam konsideris kiel nedetruebla ŝirmilon, fariĝos la kaŭzo mem de ilia pereo, ĉar la kredoj, ŝtoniĝinte, dum la socio iras antaŭen, kadukiĝos kaj poste estos kuntrenitaj de la progresintaj ideo-fluoj. (...)*


*"Kiam la religiuloj konvinkiĝos pri tio ke ekzistas nur unu Dio en la Universo kaj ke Li definitive estas tiu sama, kiun ili adorinklinas sub la nomoj de Javeo, Alaho aŭ Dio; kiam ili interkonsentos pri la esencaj karakteroj de la Dieco, tiam, komprenínte ke, se estas unu sola Superega Estulo, unu sola devas esti ankaŭ la Superega Volo, kunplektos inter ili fortikan ligilon de Solidareco, kiel servantoj de unu sola Mastro kaj gefiloj de unu sola Patro".*

(...) La cirkunstancoj esprimas la Suverenan Volon de Dio. Koncernas nin, Homaj Estuloj, scii distingi ilin sur la Tero kaj en la Ĉielo de la Tero (…).

## Edukado por nova vidpunkto

La disfaloj de baroj, kiuj apartigas la popolojn, antaŭviditaj de Kardec, postulas Edukadon malsaman de tiu konata, ĉar la Spirito devas esti rigardata en ĝia dia dimensio, laŭ kiu Amo, kiu estas Dio, montras sin kiel potenca helpilo de progreso.

**H. G. Wells** (1866-1946), fama aŭtoro de *Batalo de la Mondoj*, prezentis tiun ĉi trafan konsideron:




H. G. Wells

— *"La historio de la Homaro pli kaj pli iĝas konkurado inter edukado kaj katastrofo".*

## Jesaja admonas

Nepras vivigi la spiriton de Karitato*8 en la Animo de la homoj. Sufiĉas observi ĝis kiaj kondiĉoj ni kondukas nian amatan Planedon, nian komunan kaj nuran loĝejon. Oni ne plu povas nei la pereigan kunlaboron aranĝitan de ni al ĝia detruo. Temas pri vera memmortigo, ĉar la detruo de la Naturo estas la estingo de la Homa Raso.



Paz para Milênio - esperanto ok.20 20 10/10/2007 18:36:07

Pravas la Profeto **Jesaja**, en la Malnova Testamento de la Biblio:



Jesaja

*"5 Kaj la Tero estas malpurigita de siaj loĝantoj; ĉar ili malobeas la instruojn, ŝanĝas la leĝon, detruas la eternan interligon.*

*"6 Pro tio malbeno konsumas la teron, kaj kulpiĝas tiuj, kiuj loĝas sur ĝi; pro tio forbrulos la loĝantoj de la lando kaj restos malmulte da homoj".* (Jesaja, 24: 5 kaj 6).

## La Parolo de la Profeto Mahometo

Ankaŭ la granda Profeto Mahometo (570-632) — *"La paco kaj beno de Dio estu kun li"* —, registris gravan admonon en la Korano-Suraoj*[9]:

— *"Kiam la tero skuiĝos per sia tremego, kaj la tero elpelos siajn ŝarĝojn, kaj la homo diros: 'kio okazas al ĝi?', en tiu tago ĝi rakontos siajn rakontojn laŭ tio, kion revelaciis al ĝi Via Sinjoro. En tiu tago eltombiĝos la homoj po grupoj, por ke estu montritaj al ili iliaj faroj. Tiu, kiu faris Bonon, eĉ tiel malgrandan kiel sableron, tiu tiam vidos ĝin; kaj tiu, kiu faris malbonon, eĉ tiel malgrandan kiel sableron, tiu tiam vidos ĝin".*

## La inteligenta agado de la Animo

La Karitato, rigardata kiel sinonimo de Solidara kaj Frateca Amo, estas pli ol simpla ago disdoni panon. Ĝi estas la intelekta agado de la Animo, la pragmatismo de la diaj veroj, ago de justeco kaj saĝeco, la ekzisto-pravo de la ŝtatisto de la Tria Jarmilo, kapabla, per la malŝparemo reganta en la menso de multaj homoj, savi el malsato tutajn popolamasojn.

## La esenca helpilo

Karitato estas esenca helpilo por transformiĝo de la planeda vivo. Ĝi devus esti la lumo, kiu inspirus la popolajn registarojn. Iam tiel okazos. Malkredi tion estas dubi pri la saneco de la popolamasoj. La lernejaj kaj universitataj rondoj ne povas preterlasi la instruon de ĝiaj principoj vigle rekomenditaj de religiofondintoj kaj de ties plej sentemaj gvidantoj. Karitato estas realiganta ago naskita el la sento de Solidareco kaj de simpla Homo kaj de publika Homo, kapabla instigi en ili la konsciencon pri la plenumenda devo. Tiamaniere ĝi fariĝas Paco por la Spirito, kaj sekve, ankaŭ por la Homaro. (…) La milito, antaŭ ol eksplodi en la mondo, kreskas ene de la individuoj. (…) Karitato estas la plej sukcesodona rimedaro por la Paco, kiam rigardata ankaŭ kiel Frateco kaj Solidareco socia, homa kaj politika. Ĝi estas multpova strategio ankoraŭ ne disvolvita de la plej rafinitaj taktikistoj. Por ĝin efektivigi nepras etiko, decidemo kaj kuraĝo.

La ideologioj, kiuj ĝin flanken metis, tiuj mem

---

*[8] **Karitato** — Legu la opinon de Paiva Netto pri la temo en la beletristika eseo *A Política da Caridade Completa* [La Politiko de Plena Karitato] baldaŭ aperonta en la ĉefaj librovendejoj kaj gazetĵurnaloj.
*[9] **Korano** — Sankta Korano.



Paz para Milênio - esperanto ok.21 21 10/10/2007 18:36:20


spektas sian propran pereon aŭ estas devigataj akceli la akcepton de ĝia eksterordinara valoro en la enkonduko de la urĝaj transformiĝoj, kiujn la monda socio bezonas por fuĝi el la pereo, ne nur antaŭvidita de mistikuloj kaj profetoj, sed ankaŭ de laikoj kaj nekreduloj pri la Dia Mekanismo ravanta la Universon (…).

## Limoj minacataj

La kulturoj, kiuj ĝin spertas nur kiel oportunan agadon oferi al la malriĉuloj la manĝado-restaĵojn, tiuj mem havos siajn limojn minacataj de bandoj da malesperuloj, kaj estos devigataj alfronti homajn necesbezonojn pli urĝajn ol tiu konsistanta el materia nutraĵo: temas ankaŭ pri flegado de la digno kaj Amo, kiujn ni ĉiuj aspiras.

## Du elcento

Kiel mi skribis, frue en la 1980-aj jaroj, estas sciate, ke du elcento de la monda produktado sufiĉus por forigi la malsaton en la Planedo. Tion montris la ekspertizisto pri la temo, D-ro **Mário Altenfelder.** Kaj kial oni ne forigas? Ĉar malvarma ankoraŭ estas la koro de multaj homoj. La Ekonomio laŭiras vojon for de Dio, forgesita pri tio, ke la civitano estas la Dia Kapitalo, ĉar la homa vivo estas la Superega Bono.


Arkivo BV
Vergilio

La senmodera polucio (korpa kaj mensa) samkiel la detruemaj armiloj, frukto de misuzado de nuklea energio kaj de biologia kaj ĥemia konaro, rezultas el morala dekadenco. Ĉi lastan oni nepre devas superi per granda prudento-movado, por ke efektiviĝu la monda kunfratiĝo (...).

## Solidareco kaj Strategio

De longe ni substrekas, ke Solidareco ampleksiĝis el la luma vojo de etiko kaj sin prezentas kiel strategio, por ke la Homo povu garantii sian postvivadon. Al iuj efektoj de tutmondigo produktantaj mizeron, ni kontraŭstaras per universaligo de Frateca Amo kiel forta ilo de reago al la pseŭdofatalismo de malriĉeco. (...) Antaŭ jarmiloj admonis **Vergilio** (70-19 a.K.), en sia *Eneado**[10]:

— *"Malsato estas malbona konsilanto".*

Tial, antaŭ dekoj da jaroj, mi lanĉis al la konsciencoj la proponon pri la Ekonomio de Homa Solidareco kadre de la Strategio por Postvivado.

## Amo estas la diferencigo

La internacie ampleksaj programoj edukaj kaj sociaj de Legio de Bona Volo, kiuj estas plibonigantaj la vivo-kvaliton de amasoj da senhavuloj, je korpo kaj Animo, estas ekzemplo de tio, ke Amo estas la diferencigo. Kaj ĉio, kion ni disponis en la komenco de niaj agadoj, por helpi tiun tutan Popolon estis nur Amo, la vorto kiu plene resumas la sencon de Pedagogio. Nenio pli....

Venos tempo majesta, kiam la Homo akceptos nur unu dogmon, tiun de senlima Frateco. Tiam ĉio ĉi estos komuna al ĉiuj kiuj laciĝas pro malamoj kaj netoleremaj malpaciĝoj. Dio estas la Lumo de la Mondo.

*[10] ***"Malsato estas malbona konsilanto"*, diris Vergilio en sia *Eneado*** — Paiva Netto kutimas citi tiun ĉi frazon, ĉar ĝi estas tre pensiga kaj grandamplekse nuntempa.



Paz para Milênio - esperanto ok.22 22 10/10/2007 18:36:33

## La senco de Religio

En miaj artikoloj aperintaj en *Folha de S.Paulo* kaj en aliaj publikigaĵoj, en Brazilo kaj alilandoj, en la 1980-aj jaroj, mi asertis, ke mi ne rigardas Religion kiel luktejon, kie la diversaj kredoj reciproke sin perfortas en atako aŭ defendo de siaj principoj, aŭ de Dio, kiu estas Amo, kaj sekve ne povas aprobi malamajn agojn je Sia Sankta Nomo, nek bezonas koleran defendon de kiu ajn. Avertis Alziro Zarur, Fondinto de Legio de Bona Volo:

— *"La plej granda krimulo en la mondo estas tiu, kiu predikas malamon nome de Dio".*

## Religio en la avangardo

Mi komprenas Religion kiel Fratecon, Solidarecon, Unuiĝon, Respekton al la Vivo, Iluminiĝon de la Animoj.... Mi nur povas kompreni ĝin kiel ion dinamikan, vivantan, pragmatan, realigpovan, kiu malfermas lumvojojn en la Spirito de la homoj, kaj tial devas iri avangarde. Mi ne povus ĝin kompreni, se ĝi efektive ne kontribuus al la transformiĝo de tiuj domaĝaj realaĵoj ankoraŭ premantaj la popolojn. Ĉi lastaj, pli kaj pli bezonantaj Dion, kiu estas la kontraŭ-veneno por la homaj malbonoj, moralaj kaj spiritaj, inter kiuj neniofarado, fanatikeco kaj sektemo pereigaj, kiuj ombras la Spiriton de la homamasoj.

## Religio kaj Frateco

Religio celas la pliboniĝon la Homon, proksimigante lin al lia Kreanto per praktikado de Frateco inter Ties kreitoj. La Profeto el Islamo tre oportune proklamis en la *Sankta Korano*:

*"— Ni kredas je tio, kio al ni estis revelaciita kaj je tio, kio al vi estis revelaciita. Nia Dio kaj via Dio estas la sama. Al Li ni submetas nin".*

## Dio, Saĝeco kaj Kompreno

La Ĉiela Patro, for de la analizado pure antropomorfa, estas neelĉerpebla fonto de Saĝeco kaj Komprenemo.

Ĉio evoluas. Antaŭe oni asertis, ke la Tero estas la centro de la Universo. Ĉio ja evoluas! Kial do la religioj devus stagni? Male, Religio, se ĝi estas sinonimo de

MI KOMPRENAS RELIGION KIEL FRATECON, SOLIDARECON, UNUIĜON, RESPEKTON AL LA VIVO, ILUMINIĜON DE LA ANIMOJ.... MI NUR POVAS KOMPRENI ĜIN KIEL ION DINAMIKAN, VIVANTAN, PRAGMATAN, REALIGPOVAN. (...)

Solidareco kaj Favorkoreco, devas harmonie marŝi en la avangardo. Tre oportunaj estas tiuj vortoj de la ĝisosta skeptikulo **Voltero** (1694 – 1778):

— *"Toleremo estas tiel necesa en Politiko kiel en Religio; nur la fiero estas netolerema".*


Reprodukto BV
Voltero

## Respekti la ateistojn

Verdire, la vera religiulo respektas la ateistojn, ĉar fakte ankaŭ ili estas filoj de Dio (do niaj Fratoj). Ĝi estas ekumena vero; kontraŭe, por kio la religia sento, kiu devas, ekzemple, kunigi nin al la strebado kontraŭ malsato kaj perforto?

## Religio por varmigi la fridecon

Konvenas rememori tiun ampleksan konsideron de la karmemora Zarur:

— *"Religio, Filozofio, Scienco kaj Politiko estas kvar aspektoj de la sama Vero, kiu estas Dio".*

Nu, voli konservi tiujn branĉojn de la universala sciaro, apartigitaj en nekomunikaj fakoj aŭ en abomena konflikto, jen la fonto de multaj malbonoj nin afliktantaj, ĉefe kiam temas pri Religio, rigardata laŭ sia plej alta signifo de Frateco. Ĉefe de ĝia agadkampo devas veni la spirito de Solidareco kiu, mankanta al Komunikado, Scienco, Filozofio, Edukado, Ekonomiko, Arto, Sporto kaj Politiko, rezultigas fridecon de sentoj, kiuj karakterizas la homajn interrilatojn en la lastaj tempoj.

## Efika Edukado


La manko de Frateco estas la kialo de tiu granda breĉo inter materia progreso kaj morala kaj spirita maturiĝo. Sed ĉiam estas horo por kvietigi malamegojn. Ne ekzistos Paco tamen, dum persistos kruelaj homaj antaŭjuĝoj kaj krimaj klaso-diferencoj instigataj de monavido, kiun ni, per efika Edukado kun Spiriteco, devas kontraŭbatali.

## Progreso kun Spiritualeco

Per insisto al serĉado de tiu progreso, kiu senvalorigas la sencon de Spiritualeco, kiu estas la interna rilato inter la kreitoj kaj ties Superega Kreanto, la Homo kondamnas sin al konstanta malhumaneco. Tiu stato de ĝenerala anormaleco rezultas el la militema mensostato, kiun generacioj post generacioj, ekzemple, preferas al la Nova Ordono de Jesuo:

— *"Vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos Amon unu al alia. (...) Jen estas mia Ordono: ke vi amu tiel same, kiel Mi vin amas. Neniu havas Amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian Vivon por siaj amikoj. Vi estas miaj amikoj, se vi faras tion, kion Mi al vi ordonas: Vi amu, kiel Mi vin amis. Mi jam ne nomas vin sklavoj, ĉar la sklavo ne scias, kion lia sinjoro faras; sed Mi nomis vin amikoj, ĉar ĉion, kion mi aŭdis de mia Patro, mi sciigis al vi. Vi ne elektis min, sed Mi elektis vin, kaj starigis vin, por ke vi iru kaj donu frukton, kaj ke via frukto daŭru; por ke la Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de Li en mia nomo. Tion Mi ordonas al vi: ke vi*

*amu, kiel Mi amas vin. (...) Kiel la Patro min amas, tiel Mi ankaŭ vin amas; restadu en mia Amo".* (Evangelio de Jesuo, laŭ Johano, 13:34 kaj 35; 15:12 al 17 kaj 9).


Arkivo BV

## Avido de la Animo

Jen la Leĝo de la Universala Amo — majstre difinita de Alziro Zarur kiel *"la esenco de Dio"* — kiu, pro sia sublimeco, ŝvebas super ia ajn dogma kverelo, ĉar ĝi estas parto imanenta de la homa animo, kie ajn ĝi troviĝas.

## Interreto kaj Solidareco

En unu el miaj kronikoj por la iama magazino *Manchete* (Rio-de-Ĵanejro, Brazilo), *Genoma, Ética e Fraternidade* [Genomo, Etiko kaj Frateco], mi asertis:

Neniam, pli ol nun, iĝas tiel necesa la praktikado de ĉio, kion resumas la esprimo Frateco. La teknologio superas barojn. Interreto estas unu ekzemplo. Sed kiam ni vidos Solidarecon elvolviĝi antaŭ ĝi, lumigante ĝiajn vojojn? (...)

## La Genomo de Dio

La elkodigita homa genomo kaj ĝia kombinserio, unuafoje eltrovita en la Historio, senvualigas mirindajn horizontojn kaj samtempe starigas serion da etikaj demandoj, kiuj atendas urĝajn solvojn. (...) Nepras do ke ni deĉifru, por ĝuste uzi ĝin, la Genomon de Dio, la ekzisto-pravon de ĉio: la Amo, kiu nin subtenas kaj estas la motivo kial ni ankoraŭ kunvivas tie ĉi... sur la Tero. Malgraŭ la suferego, nia prefero estas la postvivado.

## Teknologio kaj Spiritualeco

Nepras la ekesto de ekvilibro inter la progreso teknologia-materia kaj etika-spirita. Dum tio ne efektiviĝos, la danĝero plue ŝvebos kiel la glavo de Damoklo supre niaj kapoj. Ĉu mankas io al teknologio? Jes: koro kaj menso iluminitaj, Solidareco! Verdire, mi estas konvinkita, ke tiu paradigmo-ŝanĝo okazos (kiel jam konstateblas), malgraŭ la rezisto de multaj.

## Spiritualeco venis por restadi

Spiritualeco ne estas modo. Ĝi venis por restadi! Temas pri eksterordina-



Paz para Milênio - esperanto ok.25 25 10/10/2007 18:37:32

La fizika mondo ne plu evoluos sen la evidenta helpo de la Spirita Mondo. Jen la valora instruo, kiun la nacioj spertos tra la paso de la Tria Jarmilo.

ra evoluo-stadio de la homa konscienco. Se iam ni aliiĝis de instinktaj prauloj al civilizitaj raciuloj, jen de nun ni aliiĝos de egoismaj raciuloj al estuloj kun kompreno universala, kosma, ampleksa, plena je Amo.

## La Spirita Mondo ekzistas

La fizika mondo ne plu evoluos sen la evidenta helpo de la Spirita Mondo. Jen la valora instruo, kiun la nacioj spertos tra la paso de la Tria Jarmilo"*[11].

Se ni ne elektos similajn vojojn, ni kondamnos nin al la realaĵo denuncita de Gandhi:

— *"Okulo per okulo, kaj la Homaro sekve fariĝos blinda"*.

Kaj la Mahatmo ankoraŭ nin admonas:

— *"La vera kono pri Religio faligas la barojn inter unu kaj alia. Per kulturo de toleremo favore al aliaj pensmanieroj, ni havigos pli realan komprenon pri nia propra mondkoncepto"*.

## Voli fari. Fari, sed ĝuste fari!

Ĉiam aperas bona solvo, kiam la homoj lojale strebas al ĝi. Kaj jen la motivo kial la Homaro, almenaŭ kiel ni povas konstati el tiaj ekzemploj, mirakle postvivas al siaj plej malbonaj tempoj de frenezo. La saĝeco el *Talmudo* prezentas sian praktikan mesaĝon:

—*"Paco estas por la mondo tio, kio fermento estas por pasto"*.

Trafe!

Kiel mi diradas al la gejunuloj de Legio Bona Volo: la demando estas voli fari. Fari, **sed ĝuste fari!**

## Nova tempo


Ekzistas tiuj, kiuj preferas pritrakti la religian spiriton, reliefigante senprudentaĵojn de kelkaj el ĝiaj reprezentantoj tra la jarmiloj. (Neniel mi aludas la prudentajn historiistojn kaj analistojn.)

*[11] Eltiraĵo de la libro *Somos todos Profetas* [Ni Ĉiuj Estas Profetoj] (Eldonejo Elevação), de Paiva Netto, aperanta en la ĉapitro "Ekvilibro kiel celo". La kolekto el kiu parte konsistas tiu ĉi libro — Apokalipso de Jesuo por la Kore Simplaj — atingis la signifan markon je 1,3 milionoj da ekzempleroj. La aliaj titoloj de la kolekto estas *La Profetaĵoj sen Mistero* kaj *Apokalipso sen timo*.



Paz para Milênio - esperanto ok.26 26 10/10/2007 18:37:45

Mi kredas, ke tiu tempo finiĝis, ĉar pli grandaj estas la kialoj kiuj devas nin kunfratigi ol tiuj, kiuj nur utilas por inciti malamon.


Reprodukto BV
Martin Luther King

**Malamo estas armilo turnita kontraŭ la brusto de tiu, kiu malamas**. Tre oportuna do estas la averto de la usona Pastoro **Martin Luther King** (1929–1968), kiu ne rifuzis sian propran vivon pro la idealoj, kiujn li defendis:

— *"Ni lernis flugi kiel birdoj kaj naĝi kiel fiŝoj, sed ni ne lernis la arton kunvivi kiel fratoj".*

Jen la momento por ke ni efektivigu tiun noblan lernadon.

Tial mi kutime diras en miaj artikoloj por la gazetaro kaj improvizaj prelegoj, por radio, televido kaj interreto: **La miraklo, kiun Dio atendas de la Homoj estas ke ili lernu ami sin reciproke**. Jen, tiam, ni efektive konos Pacon.

ĈIAM APERAS BONA SOLVO, KIAM LA HOMOJ LOJALE STREBAS AL ĜI. KAJ JEN LA MOTIVO KIAL LA HOMARO, ALMENAŬ KIEL NI POVAS KONSTATI EL TIAJ EKZEMPLOJ, MIRAKLE POSTVIVAS AL SIAJ PLEJ MALBONAJ TEMPOJ DE FRENEZO.

PhotoDisc





Kunsidejo de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj

# Pintkonferenco pri Monda Paco por la Jarmilo

REEĤO



Paz para Milênio - esperanto ok.28 28 10/10/2007 18:38:01





▲ La ĉeestantaro stare aplaŭdis la mesaĝon de la Direkto-Prezidanto de LBV, nomatan *Paco por la Jarmilo*.

▲ D-ro Pedro de Paiva, ĉe la mikrofono de UN, parolante nome de Legio de Bona Volo.

**Nov-Jorko** — Ĉe la fermo de la evento, la vicprezidantino de *Pintkonferenco pri Monda Paco por la Jarmilo*, **Dena Merian**, emociplene anoncis: *"Nun ni aŭdu la lastan prelegon de la evento, per la reprezentanto de Brazilo, Legio de Bona Volo"*. Kun atento kaj aplaŭdoj la ĉeestantaro akompanis la legadon de eltiraĵoj de la mesaĝo de Paiva Netto speciale verkita por la evento.

## LBV: la brazila karismo ĉe Unuiĝintaj Nacioj

D-ro **Pedro de Paiva**, unu el la reprezentantoj de la Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo en la Konferenco, estis intervjuita de la raportisto **João Lins de Albuquerque**, en la oficiala Radio de Unuiĝintaj Nacioj. En posta komunikado al la gazetaro li substrekis: *"Pro sia efika partopreno, laŭ serioza kaj meritplena agado, LBV sukcese diskonigis nian karan Brazilon en tiel grava evento, kiel tiu Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj. Ĉar LBV estas tutmonde rekonata kaj respektata, ĝi povis reprezenti nian Landon en la debatoj pri Paco en la Tria Jarmilo, kio estas motivo de fiero por ni ĉiuj"*. Siaflanke la radiisto de UN asertis: *"Ĉefe en tiu ĉi evento, la misio de Legio de Bona Volo ĉe UN iĝis tre klara. Kunordigante la brazilan sekvantaron de religiestroj, **LBV eniris en la Historion de Unuiĝintaj Nacioj**"*.

## Ekumena Renkontiĝo en la sidejo de LBV en Usono

Post la pintkunsido en UN, pluraj brazilaj kaj alilandaj gravuloj partoprenis en la sidejo de LBV, Usono, Ekumenan Renkontiĝon aranĝitan de la Direktoro-Prezidanto de LBV, kiu en la okazo, pertelefone rekte el Brazilo, salutis la geamikojn ĉeestantajn:

*"Estu bonvenaj al la Side-*



Paz para Milênio - esperanto ok.29 29 10/10/2007 18:38:02




▲ D-ro Pedro de Paiva estis intervjuita de la raportisto João Lins de Albuquerque, en la oficiala Radio de Unuiĝintaj Nacioj.

"ĈAR LBV ESTAS TUTMONDE REKONATA KAJ RESPEKTATA, ĜI POVIS REPREZENTI NIAN LANDON EN LA DEBATOJ PRI PACO EN LA TRIA JARMILO, KIO ESTAS MOTIVO DE FIERO POR NI ĈIUJ".

D-ro Pedro de Paiva parole al Radio de UN

*jo de Legio de Bona Volo, iu speco de neformala konsulejo de Brazilo en la lando de* ***Abraham Lincoln*** *(1809–1865).*

*"La Planedo travivas gravajn momentojn. La teknologia progreso estas neevitebla, sed ankaŭ neevitebla estas la spirito de Karitato, kaj tio estas la tasko de ni ĉiuj kiuj kredas je la forto de la religia spirito. Jen kial la nacioj kiuj flanken metis religion, arton kaj la klerulojn sin damaĝis. Ni jam naskiĝas kun tiu religiema spirito, amante arton laŭ tiu aŭ alia maniero, kaj uzante la intelekton, ĉar ni ĉiuj pensas. La civilizacio ne pereos, dum la Homo plu uzos sian penson, sin tenante kiel civilizacio.*

*"La mondo travivas momentojn de tutmondigita kulturo, ĝustadire ne tiel simpatia. Kion ni vidadas estas la kulturo, sen iu ajn kulturo, subpremegi la scion. Tio konstateblas ĉiumomente. Ekzemple, kio pri muziko? Oni pli aŭdas kriojn ol melodion. Sed jam venas la tempo por kontraŭstari tiun tutmondigitan 'kulturon' (kiu*




▲ Prof. Divaldo Franco (dekstre) kaj D-ro Pedro de Paiva, reprezentanto en la evento de la gvidestro de LBV.




◄ Sankta Moŝto Dada J. P. Vaswani, el Misio Sadhu Vaswani – Hinduismo, atente legas la publikigaĵon *Paco por la Jarmilo*, de LBV.



Paz para Milênio - esperanto ok.30 30 10/10/2007 18:38:05

*multokaze faciligas nur al ambicio gajni monon per iu ajn rimedo) al kulturo de Frateca Amo, 'kiu naskas vivon, kiu ĉieas kaj estas ĉio'. Antaŭ tio, estas miraklo ke ni plu vivas, ĉar iuj frenezuloj, kiuj gvidas la Homaron ankoraŭ ne sukcesis pereigi la surterajn estulojn, kaj ni esperas ke ili neniam sukcesos fari tion. Ni daŭre tenas nian obstinecon pluvivi, ĉar ni kredas je tiu miraklo, kiun Dio atendas de la Homoj: ke ili lernu ami sin reciproke.*

*"Kion ni spektas, laŭ nin instruas la Historio, ĉar nenio estas linia en la evoluo de la Homo, tio estas iu Nova Renesanco.*

*"Kaj Brazilo ĉeestis tie, en la* Pintkonferenco pri Monda Paco por la Jarmilo*, okazinta en UN, ĉar tio estas ĝia rolo. Ĉiu nacio ludas iun rolon en la mondo. Tiu de Brazilo estas alporti novan senton de Paco pere de simplaj homoj, kiaj estas ni ĉiuj.*

*"Mi dankas viajn ĉeestojn. LBV estas la domo de tiuj, kiuj volas trafi, de tiuj, kiuj scias, ke Amo estas la Sublima Nutraĵo, kiu tenas nin vivaj. La Homo bezonas la libereco-panon, sed ne ekzistas libereco for de la lumo de Frateca Amo, lastatempe tiel malofta en la mondo. Temas pri la plej potenca instrumento, kiun ni tenas en la manoj, ĉar ĝi estas, esence, Dio mem. Ĝi estas la spirito de Karitato, kiun vi ĉiuj, kune kun ni, alportis al tiu historia 1-a Konferenco.*

*"Eĉ se Brazilo estus flanken metita je ĉiuj faktoj okazintaj dum tiuj tagoj, oni ne povus ne konsenti, ke viaj ĉeestoj tie havas gravan signifon, kiel montros la tempo. Ke ni estu do la ramo de nova tempo, meze de tempo, kiu ankoraŭ akceptas, ke iĝi religiulo estas malpaciĝi kun sia similulo — kiam temas ĝuste pri la kontraŭo. Ni laboru kun la rimedoj al ni disponeblaj. Gravas, ke tiu sento de fido ĉiujn pacigu. Ĝi troviĝas en la Biblio, en la Korano, en la*

En la jaro 2000, la Spirita Reprezentantaro ĉeestanta la eventon en la sidejo de LBV konsistis el (maldekstre dekstren): D-ro Altivo Ferreira, vicprezidanto de Brazila Spiritisma Federacio; S-ino Yola Borges de Souza kaj ŝia edzo, D-ro Juvanir Borges de Souza, Prezidanto de BSF; Joaquim Villarraga; D-ro Charles Kempf, vicprezidanto de la Franca kaj Francparolanta Spiritisma Unuiĝo; D-ro Fábio Villarraga, vicprezidanto de Kolombia Spiritisma Konfederacio; D-ro Nestor Masotti, Ĝenerala Sekretario de Internacia Spiritisma Konsilantaro (nuntempe Prezidanto de Brazila Spiritisma Federacio), kaj lia edzino, Maria Euny Masotti, kaj Jussara Korngold.



Arkivo BV



Paz para Milênio - esperanto ok.31 31 10/10/2007 18:38:06

## “Ĉefe en tiu ĉi evento, la misio de Legio de Bona Volo ĉe UN iĝis tre klara. Kunordigante la brazilan sekvantaron de religiestroj, LBV eniris en la Historion de Unuiĝintaj Nacioj”.

***João Lins de Albuquerque***
*en la oficiala Radio de Unuiĝintaj Nacioj*

▼ La reprezentanto de LBV ĉe UN, Conceição de Albuquerque, liveras la revuon *Solidara, Altruisma, Ekumena Socio* al la Ĝenerala Subsekretario de Unuiĝintaj Nacioj pri Komunikado kaj Publikaj Informoj, Shashi Tharoor.




▼ Ekumena kunveno en la Sidejo de LBV, en Usono. Personuloj el Brazilo kaj eksterlando man-en-mane ekumene preĝis favore al Paco.




*Elkodaĵo de Kardec, en la libroj de Budhismo, Ŝintoismo, Bramanismo, Umbando, Mazdaizmo, de la Bahaiistoj, de la Mormonoj. Ĝi estas ĉie, ĉar Dio disemas Sian Amon tien kie estas Liaj kreitaroj.*

*“Fortan ĉirkaŭbrakon. Bondezirojn. Kun la paso de la tempo, la merithava strebo iĝos sukcesplena.*

*“La Domo estas via. Kaj ĝi pli ampleksiĝos, ĉar la forto, kiu kunigas nin estas la Bona Volo; ĝi ne estas tiu bona intenco ‘el kiu la infero estas pavimita’. Temas pri la Bona Volo de homoj, kiuj sin klerigis per la kono de la Dia Vero kaj kiuj scias, ke la plej grava afero en tiu ĉi mondo estas helpi la similulon, ne nur koncerne liajn privatajn problemojn, sed ankaŭ koncerne tiujn sociajn. Tial ni pledas por Amo ne nur en Religio, sed ankaŭ en Scienco, Politiko, Ekonomio,*



Paz para Milênio - esperanto ok.32 32 10/10/2007 18:38:08

Mário Bosso



▲ En 2000, D-ro Pedro de Paiva, el LBV, kaj Santiago Mourão, Konsilanto de Brazila Konstanta Misio por Unuiĝintaj Nacioj.

La indiĝeno **Marcos Terena,** akompanata de kvin aliaj reprezentantoj de indiĝenaj popoloj, nome Pataxós (el Bahia, Brazilo), Terenas (el Mato Grosso do Sul, Brazilo), kaj Xavantes (el Amazonio, Brazilo) —, parolis pri la ĝojo viziti la sidejon de LBV en Usono: *"Jen laboro naskiĝinta en Brazilo, nome la Bona Volo inter la homoj, la strebado al Solidareco, kun oficejo en Unuiĝintaj Nacioj. Ni esperas, ke LBV daŭrigu sian vojiradon, kun fido je sia forto kaj kapablo konvinki, transformi la mondon, ĉar tiu estas la revo ankaŭ de la indiĝenaj popoloj: igi la blankulon respekti la indiĝenon, kaj la indiĝeno respekti la blankulon laŭ ilia vivmaniero".*

Conceição de Albuquerque



▲ La gekantistoj Beatrice kaj Joseph Malovany, el la Sinagogo situanta ĉe la 5-a Avenuo, en Novjorko.

*Arto, Sporto kaj tiel plu.*

*"Koran dankon pro la atento, kaj vivu Jesuo, vivu Dio, vivu ĉio, kio povas nin kunigi, ĉar ni travivas gravan momenton en la vivo de la Homaro. Aŭ ĝi integriĝas, aŭ ĝi malintegriĝas. Kaj ni volas esti integriĝintaj al la Dia Povo, ĉar io nepre okazos: la Homo, ĉu per Amo, ĉu per doloro, fine lernos esti humana".*

## Ĉeestintaj personuloj plenapogas la proponon de LBV


Multaj geamikoj kunfratiĝintaj en la sidejo de LBV, Usono, sin prezentis apoge al al Senlima Ekumenismo disvastigata de la Institucio tra la mondo.


Nome de la Tribo Xavantes, parolis ties tribestro **Benjamim**: *"Mi vidas LBV nun, hodiaŭ, ĉi-momente. Fama laboro, kiu disvastiĝis. Ĝi gravas ankaŭ por la indiĝenoj. Mi aŭdis ĉion kion la Prezidanto Paiva Netto diris al ni ĉi tie. Do, mi estas tre kontenta; dankegon al li. Tiu estas la unua fojo, ke mi aŭdas lian voĉon, sed unu tagon, se Dio permesos, mi konatiĝos kun li. Ni povos amikiĝi, koni unu la alian kaj ankaŭ plifortigi nian Spiriton. Mi estas tre interesata pri lia parolo. Mi sendas mesaĝon: estas granda honoro por mi, iam esti invitita de vi, se Dio volos. Mi pretas iri ĝis tiu punkto, de la unuiĝo de lia popolo kun la indiĝena popolo".*


Laŭ la tiama Prezidanto de Brazila Spiritisma Federacio, **Juvanir Borges**, *"Legio de Bona Volo donas al ni tre grandan ĝojon, ĉar ni parolas la saman lingvon, en tiu senco, ke ĉiuj religioj predikas Amon al nia proksimulo, al la Dio de nia koro, kaj tio estas la unua paŝo por la interkompreniĝo, kiu devas*



Paz para Milênio - esperanto ok.33 33 10/10/2007 18:38:10


Mário Bosso


Mário Bosso


Mário Bosso

▲ Chidananda Saraswati (Muniji), Prezidanto kaj Spirita Gvidanto ĉe Parmath Niketan Ashram de Hinduismo (maldekstre); Francis Cardinal Arinze, Prezidanto de Pontifika Koncilio por Interreligia Dialogo ĉe Vatikano kaj portanto de la mesaĝo de Lia Papa Moŝto Johano Paŭlo la 2-a (memore), por la *Pintkonferenco pri Monda Paco por la Jarmilo* (meze), kaj Siddha Shiva Yoga, Majstro pri meditado, ankaŭ ricevis la publikigaĵon de LBV speciale eldonitan por la evento.

*ekzisti en la tuta Homaro. Organizaĵo kiel LBV, ekumena, aganta en la mondo, ludas gravan rolon. Mi dankas la akceptadon ĉe LBV, en Usono, ĉar tie ĉi mi nur trovis amikojn".*

La spiritista konferencisto **Divaldo Franco** substrekis: "*Legio de Bona Volo, kiu inkluzive partoprenas en la organizado de tiu granda evento, havas elstaran rolon, des pli ke, konservante la neŭtralecon de ĉiuj kredoj pere de Homameco, Kunfratiĝo, Unuiĝo, vokas la homojn, por ke ni trafu tiun celon, nome Pacon. Unu el la bazoj de LBV estas la simpla preĝo de Sankta Francisko el Asizo. La signifo de tiu preĝo estas, ke ĉiu homo estu Lumo, kie regas mallumo, Espero kie regas malespero, Paco kie regas milito. Kaj ĉi tiun standardon LBV levadas de sia fondiĝo ĝis nun, ĉefe kiam ĝia Direktoro-Prezidanto, Paiva Netto, montras al la mondo, ke eblas unuigi la religiulojn, sen apartigi ilin el iliaj kredoj. Kaj starigi Novan Homaron per ĝiaj bonfaradoj, portante esencan flagon, la Karitaton, kiu estas unu el la ĉefaj motoroj de Legio de Bona Volo pro ĝiaj plenumadoj en Brazilo".*

**Nestor Masotti**, tiama Ĝenerala Sekretario de Internacia Spiritisma Konsilantaro kaj nuna Prezidanto de la Brazila Spiritisma Federacio, substrekis: *"Unu el la punktoj kiun ni devas celi, estas la kompreniĝo inter ĉiuj religioj. Memkompreneble ni ne povas postuli, ke ĉiuj homoj pensu absolute egale, sed ni tute certe povas serĉi manieron laŭ kiu, ĉiuj ni povos frate kunvivi, eĉ se ĉiuj prezentas malsamajn vidpunktojn; ĉi-rilate la laboro de LBV iĝas tre signifa, ĉar ĝi helpas la homojn koni sin mem cele al frata kunvivado, malgraŭ la diferencoj de iliaj doktrinaj, spiritualismaj kaj religiaj vidpunktoj".*

***(sekvu al la paĝo 36)***



Paz para Milênio - esperanto ok.34 34 10/10/2007 18:38:12





Gilberto Bertolin

## Budhistaj monaĥoj omaĝas la gvidanton de LBV

En 1991, kiam Paiva Netto kvindekjariĝis, li ricevis de la Budhista paro Yvonette kaj Ricardo Mário Gonçalves, reprezentantoj de la Budhisma Templo Higashi Honganji, la koromo-n kaj la owan-n (veston kaj pelveton). En la sekva jaro, oni oferis al li la kesa-n (mantelon). Tiujn vestaĵojn oni liveras nur al tiuj, kies misio sur la Tero estas konsiderata sankta. En 2006, post duonjarcento da laboro en Legio de Bona Volo, la budhistaj monaĥoj refaris la riton de la budhista sankta vesto, kiun Paiva Netto estis gajninta en 1991, per nova omaĝo okazinta je la 25-a de Aŭgusto en la gvidestro-oficejo de la Institucio, en urbo San-Paŭlo, Brazilo. Konata kiel Gedappuku kaj Fukuden-e, la benata vesto, kiu simbolas la rikolton de la sacerdoto sur la kampoj de Feliĉeco kaj Libereco, estis ankaŭ eksponata en TBV, samkiel la unua.






Fotos: Clayton Ferreira




Paz para Milênio - esperanto ok.35 35 10/10/2007 18:38:17

Mário Bosso



▲ Pastoro Nehemias Marien (memore)

Mário Bosso



▲ Errol Lincoln Uys

Leila Marco



▲ Pai Jamil Rachid

La tiama Prezidanto de Tendara Unuiĝo de Umbando kaj Kamdobleo en Brazilo, Pai **Jamil Rachid**, asertis: *"Tio kion oni realigas ĉi tie estas tre grava, sed ni memorigu, ke LBV jam diskonigadis Ekumenismon ekde sia fondiĝo, antaŭ pli ol 50 jaroj. Paiva Netto, per la konstruo de la Templo de Bona Volo kaj de Monda Parlamento de LBV, kiuj jam altiris la atenton de la tuta Latinameriko kaj eĉ de la Evoluinta Mondo, estas pioniro en tiu laboro".* En la okazo Pai Jamil ankaŭ skribis en la ĵurnalo *U&C*, aŭgusta numero: *"Miajn dankesprimojn al la Prezidanto de LBV por inviti min kaj aliajn iri al UN, pruvante tiamaniere la grandan konsideron al la Prezidanto de Tendara Unuiĝo, al Umbando kaj al aliaj spiritualistoj".*

Laŭ la presbiterana Pastoro **Nehemias Marien** (1933-2007), *"la celagado, kiun LBV defendas en tiu ĉi pinta kunsido estas senekzempla. Mi petas, ke Dio benu tiun ĉi semadon, ĉar la semo, simila al tiu ĉe Pentekosto, multobliĝas tra la mondo. Nuntempe Paiva Netto estas la plej grava religiestro de nia Lando. Mi konsideras veran miraklon, ke li sukcesis fari ĉion ĉi, kaj se ni troviĝas tie ĉi, tio ŝuldiĝas al lia ampleksa pensmaniero, al lia enradikiĝinta vidado de la Amo, en kiu kuŝas la mondosalvo, ĉar Paco laŭiras tiu vojo".*

**Abba Estefans Pedla**, Paroĥestro de Katolika Preĝejo en Eritreo, asertis: *"La mesaĝo, kiun mi povis kunĝui kun LBV estis tiu de Paco kaj interamikiĝo. Se ni, afrikanoj, brazilanoj, ĉiuj, laboros por Paco kaj interamikiĝo, la mondo estos plibona. Mi kredas, ke ni povas kunhelpe labori por la bono de la socio".*

La Mahometana Gvidanto **Yusuf Estes** esprimis profundan admiron al agado, kiun li ekkonis: *"Mi ŝatus gratuli al LBV pro tiu bela mesaĝo. Mi ege miris kaj tre surpriziĝis ekscii, ke Legio de Bona Volo estas brazildevena".*

**Nina Lynn Meyerhof**, Edukistino, verkisto, Direktoro de Internacia Programo de Gvidestrado de *Children of the Earth* kaj Fondinto de Porinfana Monda Fondaĵo



Paz para Milênio - esperanto ok.36 36 10/10/2007 18:38:18




▲ Reprezentantoj el diversaj religioj ricevis kaj legis la Ekumenan Mesaĝon de Paiva Netto en Unuiĝintaj Nacioj.

*Heart's Bend*, en Nov-Jorko, Usono, pravigis la ĝojon ĉeesti la Renkontiĝon: *"Mi spertis tre profundan senton. Oni sentas iun familian etoson. Estas tre agrabla venigi homojn el malsamaj religiaj kredoj kaj ilin kunigi en unu solan lokon, des pli ke ili estas brazilanoj. Tie ĉi la diversecoj estas respektataj, ĉiuj kunfratiĝas kaj senteblas nur unu sento en tiu ĉi spaco, kio estas ja mirinda. Mi havas amikinon,* ***Nana Apadeau****, estro de Akano-Nacio, Ganao, Afriko, kiu gvidas kelkajn afrikajn grupojn por starigo de Paco en tiu lando. Ŝi estas virino tre vigla kaj laboras en rifuĝejoj. Tial mi diris al ŝi, ke estus al ŝi tre oportune ekkoni la brazilan familion. Dum mi akompanis ŝin al la taksio, ŝi diris: 'Kiel bonkoraj estas tiuj homoj! Mi sentis min hejmece!' Ŝi estas nigra virino nealkutimiĝinta al amikaj interrilatoj kun la blankuloj. Do por ŝi, tiu estis eksterordinara travivaĵo. Dankon pro tio ke vi permesis, ke ankaŭ miaj amikoj partoprenu en tiu ĉi Renkontiĝo. Mi scias, ke ĉiufoje, kiam mi venos al Nov-Jorko, mi bezonas viziti Legion de Bona Volo. Mi dankas pro la oportuno iĝi mi mem parto de ĉio ĉi".*

La Pastoro **Joel Câmara**, Diakono de la Evangelia Komununo en Braziljo, Brazilo, rimarkigis: *"Mi konas la laboron de Legio de Bona Volo detempe de Alziro Zarur. Kaj tiu movado kreskis tiamaniere, ke en la pasinta jaro (1999) LBV asistis pli ol 4 milionojn da senhavuloj. Se ni, evangelianoj, kopius Paiva Netto kaj lernus de li la karitatan laboron, la manieron asisti infanojn, maljunulojn, malsanulojn, senhejmulojn, mi ne dubas, ke Brazilo estus alia. Nia komunumo konsistas el 30 milionoj evangelianoj en la tuta Brazilo. Se ĉiuj ni manĉemane laŭirus la saman vojon, laŭ sama ritmo kaj vibrado, cele al konstruado de plibona Brazilo, baldaŭ ni estus nacio-modelo por la cetera mondo".*

**Errol Lincoln Uys**, famkonata usona verkisto, ankaŭ esprimis sian vidpunkton pri la evento: *"La fakto ke Brazilo estas vera* melting-pot, *kun tiom da homoj, tiom da rasoj, havigas*

*al LBV la percepton por kunigi kaj alporti tiom da reprezentantoj al la Pintkonferenco pri Monda Paco. Mi profitas la okazon por sendi mesaĝon, respektoplenan, al D-ro Paiva Netto, kiun mi renkontis antaŭ multaj jaroj, kaj kies ĉeesto kaj konvinkpovo estas neforgeseblaj por tiu, kiu lin konas. Mi esperas baldaŭ renkonti lin”.*

## D-ino Julia Nezu: neforgesebla renkontiĝo en Novjorko

Okaze de vizito al Doktorino **Julia Nezu Oliveira**, vicprezidanto de Unuiĝo de Spiritismaj Societoj de ŝtato San-Paŭlo (USE, laŭ ĝia portugala siglo), la Legianino de Bona Volo **Isabel Paes** rakontas al ni pri la granda ĝojo aŭskulti la dignan USE-reprezentanton aludi al la vasta holistika mondo-koncepto de la Direktoro-Prezidanto de LBV, kiu praktike montras la Ekumenismon diskonigatan de la Institucio prezidata de li. Ĉar estis li kiu indikis reprezentantojn de Spiritismo, krom pluraj aliaj brazilaj religiestroj, partopreni en la *1-a Pintkonferenco pri Monda Paco por la Jarmilo*,



Clayton Ferreira

▲ D-ino Julia Nezu Oliveira okaze de intervjuo al la TV Bona Volo

okazinta en la jaro 2000 en Novjorko. Jen kuraĝa faro, je respekta sinteno antaŭ la religioj, ĝustadire, senlaca batalo por Paco kaj Ekumena Frateco entreprenita de Paiva Netto, asertas D-ino Julia.

## Alcione Luiz Giacomitti (Verkisto, konferencisto kaj entreprenisto)

*“Legio de Bona Volo sub la gvido de Paiva Netto fariĝis institucio, kiu transcendas la limojn de tiu ĉi mondo (ĉar ĝi devenas el la nevideblo), kaj estas grava por la tuta Homaro kaj la Planedo Tero. La mesaĝo kiun ĝia gvidanto diskonigas per la Religio de Dio, pli ol simpla religia diskutado, estas pura Dia Scienco haviganta al la Homaro kuracadon, por ties ĝiaj malsanoj fizikaj kaj spiritaj. La mesaĝo*



Fernando Franco

▲ Verkisto Alcione Giacomitti

*pri la Senlima Ekumenismo estas la ŝlosilo, kiu iam ebligos al la ceteraj religioj de la Tero kunigi ĉirkaŭ ununura celo. Kaj pri tio Paiva Netto kaj LBV estis pioniroj. Gratulon, Frato Paiva, pro via kvindekjariĝo ĉe LBV.”*

## La renoma verkistino Dulce Magalhães gratulas agadon de LBV en Florianópolis

Freŝdate la organizanto de la 1-a Monda Festivalo de Paco, Doktorino Dulce Magalhães, vizitis la Komunuman kaj Edukan Centron de LBV en urbo Florianópolis, Brazilo. En la okazo ŝi, intervjue al Super Reto Bona Volo de Komunikado, substrekis la agadojn diskonigitajn de la Institucio: *“Unue mi amegis la akcepton fare de la infanoj. Mi vidas tiun*



Paz para Milênio - esperanto ok.38 38 10/10/2007 18:38:23



Derli Francisco

◄ D-rino Dulce Magalhães kun la infanoj prizorgataj de LBV kaj la oficestro de LBV en la urbo Florianópolis, Brazilo, Sérgio Morello.

*laboron kiel fundamenta. Mi ne sukcesas bildigi kia estus la nuna socio sen tia agado, kun iniciato, gastigado kaj integriĝo, ĉefe de infanoj kaj junuloj, por konstruo de plibona estonteco. Mi restis emociita kaj kortuŝita pro la oportuno kunvivi kun la infanoj kaj vidi la mirindan spacon kiun LBV havas en Florianópolis. (...) Nepras esti dankemaj kaj akceptemaj ĉiufoje, kiam ni trovas iniciatojn, kiuj diskonigas tian revolucion nin vere kondukantan al humana evoluado"*, ŝi diris.

La vizitanto ankaŭ substrekis, ke la agadoj plenumitaj de la gvidanto de LBV estas inspirfonto al inda kaj bonkvalita laboro. *"Jen ekzemplo kaj modelo de sindediĉa vivo kiun Paiva Netto postlasas al ni. Nepras honorigi kaj eternigi tian iradon. Nepras percepti nian privilegion al lernado pere de agadoj kaj rezultoj, kiujn havigas al ni tiu laboro. Oni povas vidi la tutan etendiĝon de Legio de Bona Volo en tiom multaj lokoj, ĉe tiom da popoloj, kun tiom da homoj, kaj percepti la inspiron super ĉio ĉi. Ni povas ekvidi la inspiron de Paiva Netto, kiu sin fordonis al tia laboro favore al la homa bonfaro, kaj estigis ĉiun ĉi ŝanĝiĝon. Se ĉiu el ni inspiriĝos laŭ tiu modelo, ni spertos novan realaĵon"*, ŝi konkludis.

En dediĉomesaĝo de la libro *A Paz como Caminho* (Paco kiel vojo), s-ino Dulce skribis: *"Al la majstro Paiva Netto. Restu en la Paco, por la Paco, kun la Paco!!! Dulce"*.

Doktoro pri Kariero-planado ĉe Kolombia Universitato, Usono, D-ino Dulce ankaŭ estas magistro pri Entreprena Komunikado ĉe Londona Universitato, Anglio; postdiplomita pri Marketingo ĉe Altlernejo pri Propagando kaj Marketingo en San-Paŭlo (ESPM-S); bakalaŭro pri Vida Komunikado ĉe Federacia Universitato de Paranao (UFPR); fakulo pri Plenkreskula Edukado ĉe Universitato de Romo, Italio, kaj de Oksfordo, Anglio; brazila reprezentanto en la Seminario pri Kulturo kaj Komunikado ĉe Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko); artikolisto de la komerca revuo *Amanhã* (Morgaŭ); krome ŝi estas aŭtoro de la verko *Alternativas estratégicas para o varejo no Brasil* (Strategiaj alternativoj por la detalvendado en Brazilo).



Paz para Milênio - esperanto ok.39 39 10/10/2007 18:38:26


Clayton Ferreira

# La Organizo kiu edukas kun EKUMENA SPIRITUALECO

MISIO: KONTRIBUI AL LA SOLIDARA ELVOLVIĜO PERE DE PROGRAMOJ KAJ AGADOJ PRI EDUKADO KAJ PROMOCIOJ HOMA KAJ SOCIA KAPABLAJ INSTIGI LA EKUMENAN CIVITANECON PER VALORIGO DE LA HOMA ESTULO KAJ TIES ETERNA SPIRITO.

LEGIO DE BONA VOLO — 57 JAROJ DA HISTORIO



Paz para Milênio - esperanto ok.40 40 10/10/2007 18:38:27



Daniel Trevisan




Daniel Trevisan



André Fernandes

## Prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo gratulas LBV-n



Vinícius Bueno

Pedro Jacintho Cavalheiro

Tiuj estas la vortoj de D-ro **Pedro Jacintho Cavalheiro** okaze de lia vizito al Legio de Bona Volo, en San-Paŭlo/SP: *"Estas admirinda la agado de LBV! Ah se ĉiuj privataj institucioj aŭ ne, NGOJ aŭ ne, zorgus pri infanoj! Estus ŝanco por estonteco! Mi gratulas la voluntulojn kaj profesiulojn, kiuj elektis tian taskon. Tiel ni ricevas kiel oferdonojn la vivojn de tiuj infanoj. Tiuj vivoj estas ankaŭ niaj vivoj, ĉar ni vidas ilia briladon sur la okuloj de ĉi tiu infano, ĉi tie. La Brazila Esperanto-Ligo dankas la apogon de LBV. Amikan brakumon".*



Paz para Milênio - esperanto ok.41 41 10/10/2007 18:38:29




Arkivo BV

RIO DE JANEIRO/RJ

◄ Eduka, Kleriga, Komunuma Centro en Rio-de-Ĵanejro/RJ, Brazilo (Av. Dom Hélder Câmara, 3.059, Del Castilho), kun 5.000 m² da konstruita areo, prizorgas infanojn, junulojn, plenaĝulojn kaj maljunulojn, kiuj troviĝas en situacio de socia risko.



Arkivo BV

BAURU/SP



Arkivo BV

SÃO LUÍS/MA



João Preda


JUIZ DE FORA/MG

Kiam oni rigardas la defiojn de nia socio, nome Edukadon, sanon, laboron, nutradon, socian integriĝon, tiam oni konstatas, ke la Popolo ĉiam tenadas fidon al la sindediĉo, klopodo kaj agado de homoj de Bona Volo.

Nuntempe, LBV havas tradicion kun preskaŭ 60 jaroj da servolaboroj al malriĉaj homoj nialande, ĝi agade kun diversaj sektoroj (registaraj, socie respondecaj entreprenoj, internaciaj institucioj, lernejoj, popolaj komunumoj, kaj aliaj organizaĵoj de la Tria Sektoro), ĉu per starigo de oportunaj okazoj, por ke civitanoj de Bona Volo povu kunlabori por daŭrepova elvolviĝo de siaj komunumoj. Pro la multnombraj agadoj celantaj humanismon, LBV estas rekonita de Unuiĝintaj Nacioj (UN). En 1994 ĝi fariĝis la unua brazila neregistara organizaĵo aliĝinta al la Departemento pri Publika Informado de Unuiĝintaj Nacioj (DPI). En 1999 ĝi ankaŭ fariĝis la unua brazila NRO akirinta statuson de



Paz para Milênio - esperanto ok.42 42 10/10/2007 18:38:31




Arkivo BV

**ESPERANTO-LECIONOJ ►** Gerlernantoj okaze de plaĉaj ludkreaj aktivecoj lernas Esperanton en la Instituto pri Edukado José de Paiva Netto




Clayton Ferreira

ĝenerala konsultanto en la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de tiu organizaĵo (Ecosoc) kaj, en 2000, ekintegriĝis al la Konferenco de NRO-j kun Konsultantaj Rilatoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj (Congo) en Vieno, Aŭstralio.

## Socia Bilanco

La grafikaĵo prezentas signifoplenan nombron da sociedukaj helpasistoj faritaj de Legio de Bona Volo dum la lastaj 5 jaroj:




• LBV estas la unua filantropa institucio en Brazilo, kies ĝenerala bilanco estas inspektita de Liberaj Eksteraj Inspektistoj (Walter Heuer), laŭ iniciato de Paiva Netto multe antaŭe esti uzata la leĝodono, postulanta efektivigon de tiun planon.





Fotoj: Arkivoj BV

**USONO**

Sur la maldekstraj fotoj, la Juna Legianino **Mariana Malaman**, en lernĉambroj de publikaj usonaj lernejoj, unu el la volontuloj kiu efektivigas la Programon *Peace and Good Will Garden*. Supre dekstren: la duflanka kunlaborado de LBV kun la Universitata Hospitalo de NovĴerzejo, havigante komunuman sanservajn flegojn al virinoj, per profilaktikaj agadoj kontraŭ mamkancero.



**ARGENTINO**

Arkivo BV



**BOLIVIO**

Arkivo BV

Legio de Bona Volo estis fondita de **Alziro Zarur** (1914-1979) kaj fariĝis 57-jara je la 1-a de Januaro 2007. Unu el ĝiaj originalaj iniciatoj estas la disvastigado de la Senlima Ekumenismo, favorigante akordigon de la tuta homa kaj spirita sciaro per nevenkebla forto je servado al la popoloj.

Ĝia administrado estigis gigantan komunagadon, kiu distin giĝas pro altkvalita modelo de subtenado al la malriĉaj popoloj, tiel multobligante la sociedukajn programojn de LBV. Ties programoj havis superkreskon superan al 15.000%, laŭinformoj aperintaj en la magazino *Veja*, kiu tiam prezentis profilon de ĝia gvidanto.

Nur en 2006 Legio de Bona Volo plenumis ĉirkaŭ 5,7 milionojn da asistoj, pere de ĝiaj pluraj



Arkivo BV



Arkivo BV




Arkivo BV

## PORTUGALIO

Aŭtobuso de la programo *Feliĉa Rido*, kiun Legio de Bona Volo de Portugalio subtenas kun apogo de volontulaj kuracistoj , unu el la agadoj starigitaj de LBV en Eŭropo.

sociedukaj programoj kaj projektoj situantaj en ĉiuj brazilaj ŝtatoj kaj en pluraj enlandaj urboj; krome LBV agadas ankaŭ en landoj kiel Argentino, Urugvajo, Paragvajo, Bolivio, Usono kaj Portugalio, ĉiam per helpo de legio de proksimume 30 mil volontuloj.

## PARAGVAJO



Arkivo BV

## URUGVAJO

**Fasado de la bela konstruaĵo de la Eduka kaj Kleriga Instituto José de Paiva Netto —** Inaŭgurita de LBV de Urugvajo je la 29-a de Junio 2007, la loko rekte profitigos la infanojn de 2 ĝis 5 jaroj, krom junuloj kaj maljunuloj, kiuj troviĝas en situacio de socia risko, havigante kulturon kaj altkvalitan edukadon al ĉiuj. Pluraj aŭtoritatuloj prestiĝigis la ceremonion, inter ili la Ambasadoro de Japano en Urugvajo, **Massami Takemoto** (Foto 1)**.** Ĉi-rilate la japana reprezentantaro finance kunlaboris por efektivigi la projekton. **Alziro de Paiva** kun la Respondeculo de LBV de Urugvajo, **Maciel Ferreira**, malligis la inaŭguran rubandon de la Kleriga kaj Eduka Instituto José de Paiva Netto, kun kelkaj asistataj infanoj de la Institucio (Foto 2).

Fotoj: Arkivo BV

1





2






# Templo de Bona Volo kaj ParlaMundi de LBV

La devizo de Legio de Bona Volo, *Edukado kaj Kulturo, Sano kaj Laboro kun Ekumena Spiritualeco*, spegulas la ampleksan klarvidecon de Paiva Netto, kiu asertas: *"Estas necese, ke ni travivu unuecon en diverseco por ke ni venku kontraŭecon"*. Inspirite per tiuj ĉi vortoj, la gvidanto de LBV elpensis kaj konstruis la Templon de Bona Volo (TBV), inaŭguritan en 1989, kaj la Mondan Parlamenton de la Ekumena Frateco (ParlaMundi), inaŭguritan en 1994, ambaŭ en Braziljo, ĉefurbo de Brazilo



Paz para Milênio - esperanto ok.46 46 10/10/2007 18:38:44




**Ekumena Arkitektura Ensemblo de LBV konsistanta el ParlaMundi (maldekstre), administra sidejo (meze) kaj Templo de Bona Volo (dekstre). Tiu ĉi estas la plej vizitata monumento de Braziljo, ĉefurbo de Brazilo, laŭ oficialaj datumoj de Sekretariejo pri Turismo de la Federacia Distrikto (Setur). Ekde ĝia unaŭguro fare de la antaŭ 17 jaroj, je la .21-a/10/1989 ĝi jam akceptis pli ol 16 milionoj da turistoj kaj pilgrimantoj.**

(vidu adreson sur la malantaŭa kovrilo). Ambaŭ konstruaĵoj li elstaras kiel simboloj de Ekumena Spiritualeco, sankta grundo sur kiu la Homaj kaj Spiritaj Estuloj de ĉiuj rasoj, kulturoj kaj religiaj kredoj povas interfratiĝi kaj rekoni, ke ni ĉiuj havas la saman originon, nome, Amo; kaj plie, nia kumuna loĝejo estas la Planedo Tero.

Iom post sia inaŭguro, TBV iĝis la plej vizitata momumento en Braziljo, akceptante 16 milionojn da pilgrimantoj kaj turistoj, dum tiuj 17 jaroj de ekzistado, laŭ datumoj de Sekretariejo pri Turismo de la Federacia Distrikto — Setur.

La kreskanta pilgrimado al la Templo de LBV venas el tio, ke ĝi estas loko inspirita sur la Ekumena Spiritualeco, kiu devas reflektiĝi en Kulturo, Arto, Filozofio, Politiko, Ekonomio, Scienco, Sporto, Ekologio kaj en ĉiuj branĉoj de homa aktivado.

La arkitekturo de la Monumento prezentas senkomparan koncepton. La ĉefa Navo havas sepedran pirami-

Fernando Franco



Mário Soares, Paiva Netto kaj Pelé

Arkivo BV



Kofi Annan, eksa Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, kaj Conceição de Albuquerque, de LBV.

dan formaton. La ensemblo ankaŭ prezentas plurajn lokojn taŭgajn por praktikado de meditado kaj por okazigo de kulturaj aktivadoj, kiel la Artgalerio, la Egipta Ĉambro, la Nobla Salono kaj la Memorigejo Alziro Zarur (dediĉata al la memoro de la karmemora Fondinto de LBV), krom la Fonto de Energiita Akvo kaj la subteraj ĝardenoj.

Apud la Templo de Bona Volo, Paiva Netto starigis la Mondan Parlamenton de Ekumena Frateco — la ParlaMundi de LBV —, forumo por debatoj destinataj kunfratigi ĉiujn homojn kaj instituciojn de Brazilo kaj el la tuta mondo, kiuj laboras por la Monda Paco.

Asertas la Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo: *"La Monda Parlamento de Ekumena Frateco tenas siajn pordojn malfermitaj al ĉiuj Estuloj de Bona Volo. Ĝi proponas la universalan akordigon de la tuta homa kaj spirita sciaro, per nevenkebla forto je servado al la popoloj. Malkonsentoj, radikalaĵoj, ĉiaspecaj malamikiĝoj devas resti for de la debatoj kaj de la proponoj religiaj, filizofiaj, politikaj, sciencaj, ekonomiaj, artaj, sportaj kaj aliaj, ĉar la Homo naskiĝas sur la Tero por kunvivi en socio, en Solidara Socio".*

Paiva Netto kreis la Meritan Ordenon de Ekumena Frateco, premion liveratan ĉiujare en la Monda Parlamento (ParlaMundi) de LBV, ekde 1996, al tiuj kiuj, surbaze de la Senlima Solidadeco, plej elstariĝis en sia agadkampo.

Eminentaj personuloj jam ricevis la Ordenon de LBV (Monda Parlamento de Ekumena Frateco), pro sia laboro favore al la diskonigado de Paco kaj Solidareco en Brazilo kaj en la mondo. Inter ili, la ŝtatestroj **Mário Soares** (eks-Prezidanto de Portugalio) kaj **Nelson Mandela** (eks-Prezidanto de Sud-Afriko); la tibetana Gvidanto Dalai-Lamao **Tenzin Gyatso**; la eksa Ĝenerala Sekretario de UN, **Kofi Annan**, kaj la Sportisto de la Jarcento, **Pelé**, krom aliaj gravaj nomoj de diversaj sektoroj de la brazila kaj monda socio.



Paz para Milênio - esperanto ok.48 48 10/10/2007 18:38:47

Arkivo BV



Samepoke, LBV ricevis de la privata sekretariino de S-ino **Margaret Thatcher**, **Amanda Ponsoby**, afablan leteron, per kiu ŝi dankas la inviton faritan de la Institucio al la tiama Ĉefministro de Britio, por ke ŝi ĉeestu la memorindan eventon.

**Margaret Thatcher (eksa Ĉefministro de Britio)**

Arkivo BV



"Oni devas labori favore al la plej malfortuloj, nome la infanoj, kiuj estas la estontaj generacioj. Tiu ĉi laboro de LBV, fundamenta, estas la plej grava, ĉar la minaco estas reala. Nenia troigo estas en tiu aserto ke la homa specio troviĝas en danĝero: 21 mil tunoj da karbona dioksido ĵetitaj ĉiujare!... Neniu atmosfero ja povas elteni".

**Fidel Castro (Ŝtatestro de Kubo)**



Fernando Franco

La nepo de Gandhi, Arun Gandhi, prezidanto de Instituto Gandhi por Ne-Perforto, en Novjorko, kaj lia edzino Sunanda, ĉeestas omaĝon al la hindia gvidanto, en la Templo de Bona Volo. Fone, la panelo *Evoluo de la Homaro* sur kiu troveblas, laŭ aranĝo de Paiva Netto, la bildo de la Mahatmo kaj de aliaj grandaj Historio-farantoj.

"Mi estas tre feliĉa, ke la Templo de Legio de Bona Volo kaj ĝiaj volontuloj portas Ekumenismon tra la mondo. Mi certas, ke ankaŭ mia avo restus tre fiera. Mi deziras ĉian sukceson al sinjoro Paiva Netto."

**Arun Gandhi**



Paz para Milênio - esperanto ok.49 49 10/10/2007 18:38:50

# Kulturaj ligiloj

## Oomoto de Japanio donacas al gvidanto de LBV

Aneliése de Oliveira

La Direktoro Prezidanto de Legio de Bona Volo ricevis jaŭde, la 22-an de februaro, okaze de Ĉefa Asembleo de LBV, omaĝon de Oomoto (Religio bazita sur Ŝintoismo, japandevena, kun universalaj ordonoj, fondita je la jaro 1892). Tiuokaze, la reprezentanto de Oomoto en Brazilo kaj Sudameriko, Profesoro **Ŝigeki Maeda** (Direktoro de Internacia Oomoto, kies sidejo estas en Brazilio, ĉefurbo de Brazilo), omaĝis la gvidanton de LBV per vesto kaj originalaj objektoj de sia kredo.

Inter la donacoj, elstaras ceramikaĵo el Kameoka, Kyoto-regiono en Japanio, speciale verke farita de la Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto, sinjorino **Kurenaj Deguĉi**, kiel simbolo de amikaj ligiloj, kiuj unuigas LBV-on kaj Oomoton. Laŭ Profesoro Maeda, *"la Majstro Paiva Netto estas la unua, kiu ricevis tiun honoraĵon ekster Japanio"*. Ŝigeki alportis ankaŭ kimonon kun blazonoj de antikva japana provincestro de la familio Ŝimazu, potenculo de lia lando antaŭ 500 jaroj, en Kyusyu, japana distrikto. Unu el la signifoj de la emblemoj kiuj figuras en tiu sankta vesto, estas tiu, kiu reprezentas la transcendecon de Ĉielo kaj de tero, de fajro kaj akvo. Krom tio, Paiva Netto ricevis du el la plej gravaj libroj de tiu doktrino, tradukitaj al Esperanto de Maeda mem kaj poste tradukitaj al la portugala de profesoro **Benedicto Silva**, elstara esperanto-tradukisto kaj agema kunlaboranto de la brazila spiritisma movado.

Pri tia nobla pruvo de estimo, je certa momento diris la gvidanto de LBV, ke la donacaĵoj estos ekspoziciataj en Templo de Bona Volo, en ĉefurbo de Brazilo: *"(...) Mi sentas ian eksterordinaran vibron en mia Animo. (...) Mi montros tiajn honorigajn donacaĵojn en Brazilio, ĉe Memorigejo* (kiu havas lian nomon), *kun la foto*



Reprodukto de la reta paĝo de Oomoto en Japanio, kun ampleksa raporto pri la omaĝo kiu okazis en la sidejo de LBV en la urbo Rio-de-Ĵanejro, Brazilo.



Paz para Milênio - esperanto ok.50 50 10/10/2007 18:39:12

*de la Majstrino Deguĉi. (...) Tiaj altkvalitaj manifestacioj estas tiel kortuŝaj, ke ili devas esti spirite valorigataj".* Paiva Netto reciprokis per donacaĵoj, liverante al la Misiulo de Oomoto oran medalon, kiu reprezentas la koron de LBV, sur kiu estas reliefe registrita la peco el Evangelio pri kiam la Anĝeloj anoncis la naskiĝon de Jesuo: *"Paco sur la Tero al la Homoj de Bona Volo"* (Evangelio de Jesuo laŭ Luko, 2:14). La Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto ricevis la saman honoraĵon. Tiuokaze, Paiva Netto sendis al Japanio bildon, kiu montras la foton de Ekumena ensemblo de LBV en Brazilio, ĉefurbo de Brazilo, konsistanta el Templo de Bona Volo kaj Monda Parlamento de la Ekumena Frateco, kiel simbolon de amikeco inter Oomoto kaj Legio de Bona Volo.



Ceramikaĵo verke farita de la Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto: *"Majstro Paiva Netto estas la unua, kiu ricevis tiun honoraĵon ekster Japanio"*, diris profesoro Maeda.



Clayton Ferreira

De maldekstre dekstren: Sinjorino Lucimara Augusta kaj la ĵurnalisto Paiva Netto (kiu ricevis kiel donacaĵon kimonon, sur kiu estas la blazonoj de Oomoto de Japanio kaj de antikva japana provincestro de familio Ŝimazu, potenculo de lia lando antaŭ 500 jaroj). Sur la foto, ankaŭ estas vidata Profesoro Ŝigeki Maeda kaj sinjoro Jorge das Neves, esperantisto kaj Legiano de Bona Volo.

Dum sia restado en la urbo Rio-de-Ĵanejro, Sinjoro Maeda kaptis la oportunon por viziti la konstruaĵon de la eduka fako de la Institucio, situanta norde de la urbo. *"Plezure kaj honore mi vizitis la lernejon de LBV. Mi povis eniri ĉiun lernoĉambron, kie la infanoj lernas kaj ludas, por ke ili estu edukataj, feliĉaj en la socio, por ke ili fariĝu maturaj homoj, kun la necesaj kondiĉoj kiel infanoj de Dio"*, li skribis en la libro de deklaroj.

## Profesoro Maeda: "Mi sentis min pli proksima al LBV".

Majstro Ŝigeki Maeda, ano de la Internacia Verkista Asocio (EVA) — ligita al Universala Esperanto-Asocio —, verkis artikolon, kiu aperis en la oficiala revuo de Oomoto en Japanio, kies distribuado de pli ol 100 mil ekzempleroj okazas en la tuta lando de la naskiĝanta suno, artikolon titolitan "Doktoro Paiva Netto kaj LBV". Per tiu teksto la Misiulo priskribas sian rimarkindan renkontiĝon kun la gvidanto de Legio de Bona Volo okaze de la evento pri la celebro, kiu festis la 17-an datrevenon de la fondiĝo de Templo de Bona Volo. Parolante pri la afero, li substrekis: *"Li estas verkisto, kies verkoj multe furoris kun milionoj da ekzempleroj vendi-*



João Preda

Paulo César Pereira, Esperantisto kaj Legiano de Bona Volo.




Paz para Milênio - esperanto ok.51 51 10/10/2007 18:39:18




La Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto, en unu de sanktaj lokoj ĉe la sidejo de la orienta institucio, kun la bildo, kiun ŝi ricevis kiel donacon montrante la Ensemblon de LBV, en Brazilio/FD, Brazilo. Paiva Netto ĝentile sendis ĝin pere de sinjoro Ŝigeki Maeda. En la supra parto de la foto, oni vidas la bildojn de la fondintoj de la japana religio.

*taj, kaj plue, li estas ankaŭ komponisto de klasika muziko".*

Pri la socia agado de Legio de Bona Volo, li reliefigis: *"(...) La agado de LBV multe kontribuadis en la kampoj eduka, kultura, amaskomunika kaj religia (precipe interreligia), ne nur enlande, sed ankaŭ eksterlande. Kaj nuntempe ĝi estas unu el la plej grandaj neregistaraj organizoj. LBV konsideras grava la principon de ekumenismo: ĝi akceptas ĉiujn organizojn, ekzemple, katolikan, spiritisman, umbandan, ŝintoisman, budhisman k.a. sendepende de iliaj doktrinoj kaj sektoj. Krome, samtempe kun sia fondiĝo, LBV enkondukis la internacian lingvon Esperanto kaj kontribuadis por la Esperanta movado.*




Ĉe la fino, li aldonis: *"Tia homo, kia Paiva Netto, kiu subtenas milionojn da homoj en Brazilo, estis, kontraste al tiu dinamikeco de la ago, persono ĝentila, simpatia kaj tre milda. Post ĉi tiu kunveno mi sentis min pli proksima al LBV".* Profesoro Maeda ankaŭ publikigis la artikolon en la paĝaro de Oomoto. Kaj en marto, okaze de la memorfestoj pri 66-a naskiĝa datreveno de Paiva Netto, la reprezentanto de Oomoto en Brazilo kaj Sudameriko, ĝentile li sendis *tankaon* al la omaĝito, ian tradician japanan poemon, por gratuli lin pro la dato: *Jen disfloras nun/ la blankaj umefloroj/ sur Brazila ter',/ miljarojn post senlime longa dorna la sufer".*

# Roman vizitis

Maria Aparecida da Silva

La Eduka Ensemblo de Legio de Bona Volo, kie lernas pli ol mil gelernantoj, kaj ĝia Komunuma Centro en la kvartalo Bom Retiro de la urbo San-Paŭlo, estis antaŭ nelonge vizititaj de la ĵurnalisto, produktanto de televida programo de la Pola TV kaj entuziasma batalanto ĉe la esperantista movado, Roman Dobrzyński.

Tre entuziasma pro la ĝojaj kanzonoj interpretitaj esperante kaj portugale, la ĵurnalisto ankaŭ ricevis desegnaĵon faritan el kartono omaĝe al li. *"Mi admiras, ke LBV daŭre evoluas kaj fariĝas ĉiam pli kaj pli granda per sia nobla laboro. La Direktoro-Prezidanto, José de Paiva Netto, laboradas de 50 jaroj ĉi tie kaj estas mia amiko de 20. Mi ad-*



Paz para Milênio - esperanto ok.52 52 10/10/2007 18:39:18

# Dobrzyński LBV-on




Amiko de LBV de du jardekoj, Roman Dobrzyński, estis akceptita per festo farita de la infanoj, kiuj lernas en lernejo de la Institucio, en San-Paŭlo/SP, Brazilo.

*miras Fraton Paiva kaj mi gratulas lin, ĉar li sukcesis kolekti tian grupon da homoj de Bona Volo"*, li diris. Admirante la altan kvaliton de strukturo de la Institucio, la ĵurnalisto memoris pri sia vizito al Templo de Bona Volo, kaj kompletigis: *"LBV ne nur agadas favore al multe da homoj, ĉefe por malriĉaj homoj, sed ankaŭ ĝi kontribuas favore al historia signifo de Brazilja"*.

Ĉeestante en la korto de la Instituto pri Edukado José de Paiva Netto (IEJPN), scivoleme, Dobrzyński petis, ke oni legu por li en Esperanto du frazojn, kiuj elstaras ĉe la eniro de la lernejo — unu de **Aristotelo** (384-322 a.K), kiu diras: *"Ĉiuj, kiuj pripensis la arton regi la homon fine konvinkiĝas, ke la sorto de imperioj dependas de edukado de la junularo"*. La alia estis verkita de Paiva Netto: *"Dum ne regos efika instruado, dezirata de ĉiuj prudentaj homoj, nacioj suferos malliberecon kaŭzatan de limigo, kiun ili trudas al si mem"*.

Kiam li parolis pri sia restado en San-Paŭlo kaj Brazilja, li memoris, ke, en 1989, li produktis dokumentarion pri centjariĝo de Esperanto, en kiun, li enmetis longdaŭran raporton pri la agado de LBV sur tiu kampo kaj inaŭguro de la Templo de Bona Volo (TBV), je la 21-a de Oktobro samjare okazinta.

## *Strato-Zamenhof* en Artgalerio de TBV

Ĉi-rilate en la Artgalerio de TBV, la ĵurnalisto lanĉis la libron *Strato-Zamenhof*. La verko prezentas, en formo de intervjuo, la biografion de **Louis C. Zaleski-Zamenhof**, nepo de Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859-1917),

> "Mi admiras, ke LBV daŭre evoluas kaj fariĝas ĉiam pli kaj pli granda en sia nobla laboro."
>
> ***Roman Dobrzyński***

kreinto de nia Esperanto. La parenceco proksmigas lian historion al la problemoj afrontitaj de la avo, en la sama tasko disvastigi ties idealon, kaj de la teruraĵoj, kiuj Zaleski-Zamenhof kaj liaj parencoj travivis en Pollando okaze de la 2-a Mondmilito, kiam ili estis persekutataj de Hitler (1889-1945), ne nur pro tio, ke ili estis judaj, sed ankaŭ pro la idealoj de la nova lingvo. Krom la travivaĵoj en varsovia getto, la leganto ankaŭ ekkonas kiel la revo de Zamenhof vivas per la entuziasmo de miloj da esperantistoj disigitaj tra la mondo.



Paz para Milênio - esperanto ok.53 53 10/10/2007 18:39:19

# Valorigo de Virino

Tradukita kaj liverita en la ses oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj, ĉi tiu dokumento de LBV rekomendas bonajn agojn por forigi diskriminacion kaj perfortemon kontraŭ knabinoj en la Homaro.



"Vi el LBV jam estas sufiĉe fortaj por preni pozicion antaŭ la ŝtatoj membroj de ĉi tiu organizo. Kun tia agado, mi pensas, ke vi meritas tutmondan rekonon."

***Hanifa Mezoui***
*Ĉefkomisionano de Ecosoc, Estro de la Sekcio pri NRO-oj de UN (NGO Section).*

**Marta Trigueiro kaj Natália Lombardi**
Fotoj: Adriana Rocha kaj Vieira Filho

La 51ª kunsido de la Komisiono pri la Statuso de Virino en 2007 okazis ĉe la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko/Usono, inter la 26-a de Februaro kaj la 9-a de Marto. Delegitaroj de dekoj da landoj kunvenis por pritrakti prioritatan temon koncerne egalecon inter seksoj: *"Forigo de ĉia diskriminacio kaj perforto kontraŭ knabinoj"*. La kunsido analizis la internaciajn politikojn, por garantio de plenumado de Deklaracio pri Rajtoj de Virinoj kaj Knabinoj.

La brazila civila socio partoprenis la eventon elstare, per dokumento de Legio de Bona Volo, kiu de 1994 estas parto en la kadroj de UN, kiel la unua brazila organizo, kiu akceptiĝis en la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de Uuiĝintaj Nacioj (Ecosoc). Ĝi estis tradukita kaj transdonita de UN en ĝiaj ses oficialaj lingvoj (araba, ĉina, hispana, franca, angla, rusa) kaj per ĝi oni prezentas bonajn agojn kaj rekomendojn, prenitajn el pluraj programoj kaj sociedukaj projektoj, kiujn la Institucio praktikas de 57 jaroj en la tuta Brazilo, krom agoj, kiuj transiras niajn landli-



Paz para Milênio - esperanto ok.54 54 10/10/2007 18:39:21


Adriana Rocha



Amado Vieira

Sur la unua bildo, maldekstre, Danilo Parmegiani, el Legio de Bona Volo, kaj D-ro Ban Ki-moon, Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj. Sur la alia, Amanda Vieira, Soldateto de Dio de LBV, pozas por foto kun la Ĝenerala Vicsekretario de UN, Asha-Rose Migiro.

mojn, kaj ripetiĝas en Argentinio, Paragvajo, Urugvajo, Bolivio, Portugalio kaj Usono.

Tuj en la dua tago de la evento elĉerpiĝis la versioj en la angla lingvo, kiujn oni devis reprovizi trifoje laŭlonge de la 12 tagoj de la kunsido. La reeĥo de la verkoj, sub la aŭtoreco de verkisto Paiva Netto, estis dissendita fare de pluraj amaskomunikiloj en Brazilo, kiel la prestiĝa *Mapa do Terceiro Setor* (Mapo pri la Tria Sektoro) de Fondaĵo Getúlio Vargas (FGV). Tiuokaze, la Ĝenerala Sekretario de UN, **Ban Kimoon**, ricevis la dokumenton kaj la revuon Solidara, Altruisma, Ekumena Socio, kaj gratulis la agadon de LBV.

Laŭ tiu Institucio, la diskutata temo devas urĝe enskribiĝi en la liston de la internaciaj, publikaj politikoj, ĉar la seksa perfortado, precipe kontraŭ knabinoj, signifas atencon, kiu ne respektas socian klason, monhavon, klerecon aŭ etnon. Tiun bedaŭrindan realaĵon pligravigas la fakto, ke la korpa, seksa kaj/aŭ psika suferoj flanke de la malplenaĝulinoj okazas ofte en la hejmo mem.

Kun la celo kontribui por reformuli la leĝojn de tutmonda kunvivado, Legio de Bona Volo elvolvas plurajn iniciatojn, kiujn oni konsideras kiel modelon de valorigo de Virino kaj de elstarigo de knabinoj. Interalie, la programo *Esti Virino* kaj la projekto Civitano Bebo, kiuj liveras psikan, nutran, juran kaj socian apogon al la helpatinoj, kaj krome helpas harmoniigi la familiojn kaj sekve agadas por preventi enhejman perforton per liverado de konceptoj etikaj, moralaj kaj spiritaj.Tiun agadon apogas la Pedagogio de Ekumena Civitano – la Pedagogio de Amo, kiun oni uzas en ĉiaj asistaj agoj ĉe LBV. Pri tiu novstila edukpropono, prelegis la Ĝenerala Vicsekretario de UN, **Asha-Rose Migiro**: *"Amo kaj komprenemo estas tre gravaj por ebligi, ke infanoj vivu pli feliĉe kaj povu koncentriĝi en aferojn, kiuj signifas por ili antaŭeniron. Ricevinte amon, infano sentas kuraĝiĝon, eklernas ami kaj tiel estigas kondiĉojn por ia etoso de Paco por ĉiuj."*

Sinjorino Migiro rekonis la klopodadon de tiu Agado por kontraŭbatali perforton kaj diskriminacion: *"Organizoj de la civila socio estas esence gravaj kunlaborantoj por ke*

Fotokopio de la dokumentoj de LBV transdonataj fare de UN en la oficialaj lingoj




Paz para Milênio - esperanto ok.55 55 10/10/2007 18:39:33


Amado Vieira

"LBV faras tiom multe por nia mondo! Mi konsideras, ke Dio mem estigis mian renkonton kun vi. Mi pensas, ke LBV estas unu el la plej bonaj organizoj ĉi tie reprezentataj en la evento, ĉar ĝi havas mirindan agadon, konon kaj spiritan saĝon".

***Nana-Fosu Randall***
*Fondinta Prezidanto de la organizo Voices of African Mothers (Voĉoj de Afrikaj Patrinoj), en la foto kun Adriana Rocha, el LBV.*

*oni atingu egalecon inter seksoj. Tial, mi gratulas LBV pro la sukceso rekte agi defende de la virino."*

Alia aŭtoritatulo de UN, kiu esprimis sian rekonon pri la servo farata de la Institucio estis Sinjorino **Hanifa Mezoui**, Ĉefkomisiito de Ecosoc, Estro de la Sekcio pri NRO-oj de UN *(NGO Section)*. Ŝi diris: *"Mi emas alporti la agadon de LBV al* AMR Innovation Fair*, kiun Ecosoc okazigos en julio, en la* High Level Segment*, en Ĝenevo (Svisio), kaj montri al la Ŝtatestroj, ministeriaj konsilantaroj kaj ceteraj partoprenantoj tion, kion vi faras internaciskale. Jen estas LBV, kun ĝeneralkonsulta statuso ekde 1999, konfirmante sian sidlokon kaj ĉion prezentante al Ŝtatestroj."*

Laŭ Sinjorino Hanifa, la agado por valorigo de Homo kaj ties eterna Spirito donas al LBV aŭtoritaton por defendi sian vidpunkton ĉe gravaj kunsidoj: *"Vi el LBV jam estas sufiĉe fortaj por preni pozicion antaŭ ŝtatoj-membroj de ĉi tiu organizo. Pro tiuspeca agmaniero, mi pensas, ke vi meritas tutmondan rekonon"*, ŝi klarigas.

## Voĉo el Afriko

La afrika kontinento estas lastatempe centro de tutmonda atento, koncerne la plenumadon de la celoj de la jarmilo, precipe kiam oni mencias forigon de ekstrema malriĉeco, de malsato, kaj de batalado kontraŭ HIV/aidoso, kontraŭ malario, kaj aliaj malsanoj. Legianino de Bona Volo **Adriana Rocha**, tiuokaze, parolis al Prezidanto-Fondinto de la institucio *Voices of African Mothers* (Voĉoj de Afrikaj Patrinoj), **Nana-Fosu Randall**, kiu entuziasmiĝis pri la dokumento de Legio de Bona Volo, ĉar ŝi vidis en ĝi celojn ankaŭ atingendajn en ŝia kontinento: *"LBV tiom multe agadas por nia mondo! Mi konsideras, ke Dio estigis mian renkonton kun vi. LBV estas organizo, kiu mirinde agadas por kleriĝo kaj spirita saĝo"*, ŝi diris per intervjuo al Supera Reto Bona Volo por Komunikado.


Alia granddimensia evento okazis en tiu periodo en la urbo Novjorko, sub la aŭspicio de Sekcio de Publikaj-Privataj Partnerecoj de Ecosoc kaj la Diplomatkomisiono de Angolo ĉe Unuiĝintaj Nacioj. La organizintoj de la renkonto invitis LBV por ke ĝi montru siajn ideojn, tiel ke ili prezentiĝu al akrikaj portugallingvaj landoj (CPLP). Vic-Ŝtatestroj el 15 provincoj de Angolo, krom la Ĉefambasadoro de la Komisiono, Ismael Martins, formis la oficialan delegitaron.

La reprezentanto de LBV, **Danilo Parmegiani**, prelegis pri la efiko de la Agado dum 57 jaroj en Brazilo kaj pri ĝia plivastiĝo al aliaj ses landoj. LBV estis konsiderata flanke de la grupo kiel la plej granda socia movado prezentita en la portugala lingvo, kaj ĝia sperto povas tute bone taŭgi por venko super la defioj koncerne progreson en Angolo.



Paz para Milênio - esperanto ok.56 56 10/10/2007 18:39:36


# Naŭ Nobel-Premiitoj PAROLAS PRI LBV




Lucian Fagundes

Adolfo Pérez Esquivel (Argentina verkisto kaj Pac-Nobelpremiito en 1980): "Ĉeesti la Templon de Bona Volo estas tre emociige kaj ankaŭ grave, ĉar vi agadas favore al la Popolo. Kaj mi pensas, ke ĉio celas konsciigon de junuloj, por ke ili estu preparataj. Kaj kune kun io tre grava: Spiritualeco. (…) Mi volas saluti Paiva Netto pro liaj 50 jaroj de kuraĝo kaj laboro favore al la Bono de la Homaro kaj de la popoloj. Fratan solidaran gratulbrakumon kaj ke li daŭrigu sian iradon estigante Esperon kaj Solidarecon ĉe la homoj."

Konsiderata kiel unu el la plej elstaraj personecoj en la XX-a jarcento, Nelson Mandela (Pac-Nobelpremiito en 1993) estis omaĝita en la kategorio *Hors-Concours*, per la Merita Ordeno de Ekumena Frateco. Okaze de vizito al Brazilo, la tiama sudafrika Prezidento deklaris: "Mi sentas "grandan feliĉon kaj honoron pro la omaĝo farita de ParlaMundi de Legio de Bona Volo".



Arkivo BV

Monaĥino Teresa el Kalkuto (memore — Pac-Nobelpremiito en 1979): "Estimata S-ro José de Paiva Netto, mi transdonas al vi miajn preĝojn por ĉiuj. Benoj de Dio estu ĉe vi en Legio de Bona Volo, kaj multaj homoj ekkonu la Amon de Jesuo pere de Monda Parlamento de Ekumena Frateco kaj konservu vivanta la Bonan Mesaĝon de Lia Amo en la mondo, amante unuj la aliajn, same kiel Li amis nin. Dio vin benu".


Arkivo BV



Paz para Milênio - esperanto ok.57 57 10/10/2007 18:39:40


Arkivo BV


Arkivo BV

Proksime al inaŭguro de la Templo de Bona Volo, la eks-Prezidento de Usono JIMMY CARTER (Pac-Nobelpremiito en 2002) manifestis per korespondaĵo sian admiron pri la ellaboraĵo (...) "Mi dankas la afablan inviton (...). Al mi tre plaĉis la distingo. Mi transdonas sincerajn bondezirojn kaj mi esperas, ke vi forte sukcesos en ĉi tiu granda okazaĵo (...)".

Pri la arktektura ensemblo, tiel sin esprimis la Dalai-Lamao TENZIN GYATSO, tibeta religiestro, kiu ricevis Nobel-Pacpremion en 1989, kaj la Meritan Ordenon de Ekumena Frateco de ParlaMundi de LBV, kadre de la kategorio *Hors-Concours*: "Estas mirinde paroli pri la Templo de Bona Volo kaj pri la Monda Parlamento de Ekumena Frateco. Ili reprezentas tion kion mi ĉiam kredis, nome ke la homoj kaj ĉiuj religioj havas la saman kapablon helpi la Homaron. Ĉiuj ili kunportas ene de si la spiritan mesaĝon pri kompato, Amo kaj pardono spirita. Tio kion LBV faras estas mirinda. Mi plene apogas tiun laboron kaj esperas, ke mia Spirito kaj Animo povos esti ĉiam ĉe vi".



Fernando Franco

D-RO JOSÉ RAMOS HORTA (timora gvidanto kaj Pac-Nobelpremiito en 1996): "La projekto de LBV estas fakte unika, konkreta, kreema, ĝi kunvenigas ĉiujn, kiuj volas Pacon, trankvilecon por religioj, por etnaj grupoj. Per ĝi, Legio de Bona Volo akceptas flankenmetitajn knabojn kaj donas al ili loĝejon, amon, Edukadon. Fine, ĝi estas eksterordinara programo, kiu devas inspiri registarojn kaj organizojn alilandajn fari la samon. Kulturo de Paco, de toleremo kaj de kunvivado inter etnaj grupoj kondukas al vera, daŭra paco kaj al socia progreso. (...) Mi emociiĝas pro ĉi tiu okazo viziti LBV-n. Mi estas profunde ravita pro ĉi tiu oportuna okazo vidi tiom da artesprimoj, spiritaj valoroj, alvoko al Paco, al konsento inter la popoloj, inter la nacioj. Mi pensas, ke estus utile kaj bone, se militantaj landoj venus ĉi tien (al Templo de Bona Volo) kaj pripensadus por konstati la malutilecon de siaj konfliktoj. Ekzistas en la mondo tiom da belaĵoj homaj kaj spiritaj, kiujn oni detruas. Kaj la Templo de Legio de Bona Volo estas fakte unika. Mi pensas, ke la plej grava aspekto de la Institucio, en ĉi tiu projekto, en ĉi tiu arkitekturaĵo, estas la spirito de etna, kultura, religia frateco, en kiu ne ekzistas sociaj, ekonomiaj malsamecoj. Ĉi tie, ĉio reprezentiĝas, ĉiuj povas dialogi. Fakte, ĝi estas ege interesa".



Paz para Milênio - esperanto ok.58 58 10/10/2007 18:39:42

Komentario de la internacia aktivulo pri Homaj Rajtoj kaj Pac-nobelpremiito, en 2003, Shirin Ebadi, kiam ŝi akceptis la reprezentatojn de LBV kaj ricevis la revuon *Solidara, Altruisma, Ekumena Socio*, okaze de evento en UN: “Mi esperas, ke eblas al la brazila Popolo vivi en Paco, libera de timo kaj timego, kiujn trudas la trairado de perforto.”







Anglikana Ĉefepiskopo Desmond Tutu (Pac-Nobelpremiito en 1984), eĉ antaŭ ol li ekveturis Brazilon — laŭ raporto de la ĵurnalo *Correio Braziliense*, de la ĉefurbo de Brazilo, en Majo 1987 —, deklaris al diplomato el Itamaraty: “Post mia alveno en via lando, mi volas renkontiĝi kun miaj kredfratoj kaj revidi du grandajn amikojn: Dom Hélder Câmara kaj la Prezidanto de Legio de Bona Volo, José de Paiva Netto”. En alia okazo, kiam li parolis al reprezentantoj de LBV, li asertis: “Mi volas laŭdi la Mondan Prezidanton de Legio de Bona Volo pro lia artikolo ‘*Apartheid* tie kaj *apartheids* ĉi tie’ (publikigita en la 30-a de Marto 1986 en la ĵurnalo *Folha de S.Paulo*), per kiu li klopodas konsciigi popolojn, ke ekzistas pluraj tipoj de rasismo en multaj mondopartoj, eĉ en Brazilo. (...) Mi volas transdoni mian grandan dankon pro lia agado. Dio benu lin kaj la estimatajn Legianojn de Bona Volo. Vi ĉiuj fariĝis, laŭlonge de via fruktodona agado, estimatajn laboristojn de Dio. Mi deziras, ke Li ĉiam pli ampleksigu Sian Regnon, por konstruigi Sian Eklezion kaj servi Siajn idojn kiuj vivas en la mondo. Dio abunde benu vin, nun kaj ĉiam!”.




Yasser Arafat (memore), Palestina Gvidanto kaj Nobelpremiito pri Paco en 1994: “(…) Mianome, nome de miaj Fratoj el la Plenuma Komitato de Organizaĵo por Liberigo de Palestino — OLP — kaj nome de nia palestina popolo, mi volas danki al via afabla invito por ke mi ĉeestu la inaŭguron de la Templo de LBV. Mi gratulas pro la aktivadoj de Legio de Bona Volo plenumataj favore al malriĉuloj kaj protekte al la Homaro, al Justeco kaj al subprematuloj (…)”.



Paz para Milênio - esperanto ok.59 59 10/10/2007 18:39:44

# LEGIO DE BONA VOLO

**Centra Sidejo**:
Rua Sérgio Tomás, 740 — Bom Retiro — São Paulo/SP— Brazilo
CEP 01131-010 — Tel.: (55xx11) 3225-4500

**Templo de la Bona Volo kaj Monda Parlamento de la Ekumena Frateco:**
SGAS, 915 — Lotes 75 e 76 — Brasília/DF
Brazilo — CEP 70390-150 — Tel.: (55xx61) 3245-1070

**TTTejo:** www.bonavolo.com

**LBV de Argentino:** Calle José Mármol, 964 — Boedo — Buenos Aires
CP C1236ABL — Tel.: (5411) 4925-5000 — www.lbv.org.ar
**LBV de Bolivio:** Calle Cuba, 1905 — Miraflores — La Paz
Casilla de Correo 5951 — Tel.: (5912) 222-5749 — www.lbv.org.bo
**LBV de Usono:** 20 Calumet Street, 1st floor
Newark/NJ — Zip Code 07105 — Tel.: (1973) 344-5338
www.legionofgoodwill.org
**LBV de Paragvajo:** Ruta Mariscal Estigarribia, 1.534, km 9
Fernando de la Mora —Tel.: (59521) 520-630/1—www.lbv.org.py
**LBV de Portugalio:** Rua Alexandre Herculano, 355 — Freguesia da Sé
CP 4000-055 — Porto — Tel.: (35122) 208-6494 — www.lbv.pt
**LBV de Urugvajo:** Av. Agraciada, 2.328 — Aguada
Montevideo — CP 11800 — Tel.: (5982) 924-2790 —www.lbv.org.uy